

1984 julio-aŭgusto
77a jaro
n-ro 943-944 (7-8)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



UK en 1986 okazos en Pekino

Vi trovos,

ke la nuna numero enhavas tri artikolojn el Jugoslavio, ĉar en tiu lando oni aktivas sur diversaj kampoj. Tio necesas. Nia ĉefartikolo de Nikola Rašić traktas agadon ĵusan, kian aktivuloj povas aranĝi preskaŭ iam ajn. La raporto de Zlatko Tišljariĉ pri la evoluo de la instrumentado, kiu nun portas la nomon de la jugoslava urbo Zagrebo, traktas agadon firman, kian celkonsciaj homoj povas plenumi kun kelkara zorga planado kaj persisto. La novaĵo pri la samurba fakgazeto *ZET* traktas aferon esence lokan, al kiu esperantistoj dum kvarona jarcento donis internaciecon, uzante Esperanton kiel informperilon. Aldone ni raportas pri du kongresoj: la franca nacia kongreso kaj la kongreso de blindaj esperantistoj, kiu okazis samtempe kun festivalo de itala kulturo. Se ni ne aperigas raporton pri via landa aŭ internacia aranĝo, tio verŝajne signifas, ke vi ne sendis tian al ni! Ĉiuokaze, tiel rapide kiel alvenos la raportoj por via sekva numero, vi povos legi pri la unua kanada Universala Kongreso. Kaj, se pensi pri Universalaj Kongresoj, ĉu vi konsentas, ke la plej grava movada novaĵo de ĉi tiu numero troviĝas sube sur ĉi tiu paĝo?

Enhavo

- 121 Lingvo kaj komunikado: Simpozio en Sarajevo (Nikola Rašić)
- 122 Revuo *Esperantologio* reviviĝos
- 123 Informado: Poezio kiel informilo (Edwin de Kock)
- 125 Kongresoj: Janton pri internacieco de Esperanto
- 126 *ZET*: 25 jaroj da praktika aplikado; 52a Internacia Kongreso de LIBE: Itala kulturo kaj blindula kongreso (Rob Moerbeek)
- 127 Fonduso Eroŝenko
- 128 Instruado: Evoluigo de la zagreba instrumentado (Zlatko Tišljariĉ)
- 130 Universitatoj: La Universitato de Unuiĝintaj Nacioj (Humphrey Tonkin)
- 131 Recenzoj: *La romantika periodo*; *Tra la parko de la franca poezio* Gaston Waringhien (J.F. Cool); *Matenaj floroj kolektitaj en vespero* de Lusin (R. Cash); *The Esperanto Movement* de Peter Forster (D. Richardson); *Vespera gruo* de Zyunzi Kinosita/Masao Miyamoto (S. Anikejev); *Elpafu la sagon* Tibor Sekelj (Li Shijun)
- 134 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri Esperanto)
- 136 TEJO-paĝo: Informado per rokmuziko (P. Aguilar Solá)
- 137 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 139 Nekrologoj (A. Boyer, Z. Dobrzyński, D. Doršić, N. Gessaga, Gim Chong-Wan, S. Herlufsén, S. Osias, R. Palacios Herranz, C. Pral, J. Raszka, B. Samimy, J.S. Veen)
- 140 Anoncetoj; Oficiala informilo de la Centra Oficejo de UEA

La kovrilo

montras la Longan Koridoron de la Somera Palaco en Pekino. Vi povos admiri ĝian pentritan longon de 728 metroj okaze de la 71a Universala Kongreso de Esperanto. Post ofica vizito de du reprezentantoj de UEA meze de majo kaj ilia raporto pri la antaŭviditaj kongresaj ejoj kaj aliaj fizikaj kondiĉoj, la Estraro unuanime faris la longe atenditan kaj strategie gravan decidon, ke de la 26a de julio ĝis la 2a de aŭgusto 1986 la 71a UK okazos en Pekino. Notu, ke estas aparte favora aliĝkotizo, valida ĝis la fino de la nuna jaro.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefona: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Redaktoro: Geoffrey Sutton.

Abonprezo varias laŭlande (Gld. 44; US \$ 18; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20 %.

Banko: Bank Mees & Hope, 's Graven-dijkwal 108, 3014 EJ Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto (financo, administrado): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

Vicprezidanto (esploroj, rilatoj kun UN): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; ☎ (315) 265 6744.

Vicprezidanto (informado): s-ro Yosimi Umeda, Tabata 1-28-13-206, Kita-ku, Tôkyô, 114, Japanio; ☎ (03) 828 6603.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23 274.

Estrarano (planado, Jubilea Jaro, landa agado): d-ro Renato Corsetti, Via Collazia 21/1, I-00183 Roma, Italio; ☎ (06) 75 85 679.

Estrarano (eksteraj rilatoj, junularo): d-rino Barbara Despiney, 3 rue Alphonse Daudet, F-75014 Paris, Francio; ☎ (1) 540 90 32.

Estrarano (kongresoj): s-ro Roland Lindblom, Stenbockens gata 109, S-136 62 Handen, Svedio; ☎ (08) 777 41 75.

Estrarano (kulturo, edukado): s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Estrarano (faka agado, aplikado de Esperanto): inĝ. Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

Simpozio en Sarajevo

Estas bele rimarki, ke oni ne ĉesis atenti mondajn komunikajn problemojn, ĉar finiĝis Monda Komunikaj Jaro. La sekva artikolo de Nikola Rašić priskribas elstaran simpozion en Sarajevo, Jugoslavio, kie 25 enlande kaj internacie konataj specialistoj pri diversaj aspektoj de la komunikado prezentis 22 referaĵojn. Eble la plej internacie konata inter la partoprenintoj estas prof. Bogdan Osolnik, ano de Komisiono McBride, kiu cetere prezidis la lastan parton de la preleg-serio. Lia respondo al specifa demando pri la raporto de tiu Komisiono substrekas ion, kion ni delonge supozas, nome estas tiuj, kiuj ne deziras neŭtralan solvon de la monda lingvo-problemo. Sed la okazigo de altnivelaj diskutoj pri la problemaro estas unu ĉefvojo al la ĝenerala akcepto de lingva egaleco en la internaciaj rilatoj.

Scienca aliro al la problemaro de komunikado ne plu estas nova en la Esperanto-movado. Male, ĝi lastatempe pli kaj pli oftas kaj progresas. Sed eble same, se ne pli, grava estas okupigo de ekstermovadaj sciencistoj kaj sciencaj rondoj pri la lingva aspekto de internacia komunikado kaj la rolo de la Internacia

Lingvo. Ĝuste tian gravan entreprenon faris Universitata Esperanto-Klubo de Sarajevo kunlabore kun la Fakultato pri Politikaj Sciencoj de la Sarajeva Universitato per organizo de dutaga seminario pri la temo "Lingvo kaj internacia komunikado", kiu okazis la 30an kaj 31an de marto.

La seminarion partoprenis sciencistoj el tuta Jugoslavio, kiuj okupiĝas pri diversaj aspektoj de internacia komunikado: jura, teknologia, sociologia, lingvopolitika, interlingvistika ktp. Interalie troviĝis famaj jugoslavaj lingvofakuloj kiel prof. Dalibor Brozović (slavisto, gvida kroata lingvosciencisto kaj esperantisto), prof. Ranko Bugarski (anglisto, ĝenerala-kaj socilingvisto), prof. Srdan Janković (arabisto, socilingvisto) kaj konata afrikistino Biserka Cvjetičanin. Sed internacie la plej elstaraj personoj estis du slovenaj Unesko-fakuloj: prof. Bogdan Osolnik, membro de Komisiono McBride pri komunikaj problemoj kaj finredaktinto de la Komisiona raporto por la beograda konferenco de Unesko "Multaj voĉoj — Unu mondo", kaj prof. Tomo Martelanc, fakulo pri televido kaj rajtoj je komunikado. La partopreno de

Foto: Mile Kovačević



Prof. Bogdan Osolnik, membro de la iama Komisiono McBride pri komunikaj problemoj, parolas en la sarajeva simpozio pri lingvo kaj internacia komunikado.

junaj scienculoj estis rimarkinde granda por similaj okazaĵoj. Oni krome povas diri, ke preskaŭ ĉiu pli grava temo el la problemaro estis almenaŭ supraĵe tuŝita.

Prof. Božidar Sekulić de la Fakultato pri Politikaj Sciencoj, Sarajevo, elstarigis en sia referaĵo, ke emancipiga teorio pri komunikado povas diri nenion sendube kaj senhezite akcepteblan por la praktiko, nome ke ĝi ne povas garantii aplikeblon de siaj konceptoj, ĉar "teoriumante, ĝi daŭre restas teorio."

Pli konkreta estis Ranko Bugarski, kiu proponis tipologion de internacia lingva komunikado, konsiderante la jenajn parametrojn: 1) Partoprenantoj de la komunikado (tuta mondo aŭ nur mondopartoj, ene de komunumoj, pli vastaj rondoj aŭ nur elitoj ktp.), 2) Kampoj de apliko (ĉiutaga vivo, amuzo, diplomatio, scienco ktp.), 3) Rimedoj de la komunikado (natura lingvo, artefarita, plana aŭ piĝina lingvo, skribata aŭ parolata lingvo), 4) Teknologio ktp.

Bugarski fine konkludis, ke ĉiu strebo al plibonigo de la tutgloba lingva komunikado devas komenciĝi ekde kiel eble plej kompleta bildo de faktaj situacioj, en kiuj komunikado povas okazi.

Ne malpli klara estis la referaĵo de Dalibor Brozović "Lingva aspekto de internacia komunikado", kiu zorge kaj severe ekzamenis la rolojn kaj ŝancojn de preskaŭ ĉiuj lingvoj, kiuj nun ludas ian internacian rolon. Li fine venis al unu nura ebla logika konkludo: elimino de perspektivaj ŝancoj de ĉiuj lingvoj krom Esperanto. Kompreneble temis pri pure logika rezonado, kiu tute ne devas kongrui kun la momenta realo kaj Brozović — estante konscia pri tio — konkludis, ke tio signifas, ke la mondo ankoraŭ ne bezonas Esperanton, sed ke eble tre baldaŭ tiu bezono efektiviĝos pli konkrete, ĉar la mondo neniam en sia historio entreprenis ion pro ties nura logikeco, sed preferas atendi ĝis "la akvo venis ĝis la gorĝo".

Tamen, eventuale pli interesa ol la referaĵoj mem estis la diskutoj inter la partoprenantoj pri Esperanto, ne malpli pro tio, ke nur kelkaj estis esperantistoj.

La aŭtoro de ĉi tiu artikolo starigis la demandon al Bogdan Osolnik, kial la rekomendo de Mustafa Mahmoudi pri planlingvoj troviĝas fine de la raporto de Komisiono McBride sub la rubriko "privataj rimarkoj". La respondo estis, ke planlingvojn la Komisiono tre serioze traktis, inkluzive de Esperanto, sed ke premo de grandpotencoj estis tro granda, por ke tio povu eniri en la oficialan parton de la raporto. Osolnik krome menciis, ke al la Komisiono estis prezentita iu nova planlingvo, laŭdire francbaza, kiu estis "pli perfekta" ol Esperanto kaj pli konvena por la komputila prilaborado.

El aliaj diskutoj la plej interesaj estis tiuj kun skeptikuloj. Kelkaj el ili asertis, ke Esperanto "ne eblas", ĉar ĝi ne havas etnokulturan bazon kiel aliaj

"normalaj" lingvoj. Brozović sprite reagis, dirante, ke estas strange, ke neniu parolis pri la eskima, verŝajne ĉar neniu konas ĝin, sed ke multaj opinias povi komplete kompreni la aferon de Esperanto sen koni ĝin. Ne ĉiuj skeptikuloj restis samopiniaj ĝis la fino de la simpozio. Tiel ekzemple prof. Hidajet Repovac, sociologo pri kulturo, videble ŝanĝis sian opinion kaj promesis esplori la aferon.

"La ronda tablo" de Sarajevo kaj ĝiaj reeĥoj longe restos en la oreloj kaj memoro de la partoprenintoj. Estiĝis multaj novaj kontaktoj kaj novaj demandoj stariĝis. Ĝi estas aparte signifa por jugoslavaj sciencaj rondoj samkiel por la landa Movado.

Fine oni devas esprimi gratulon al la junaj organizintoj de Universitata Esperanto-Klubo de Sarajevo pro la glata funkciado de la simpozio.

Nikola Rašić

Revuo *Esperantologio* reviviĝos

Unu el la juveloj de la Esperanta faka gazetaro estis la revuo *Esperantologio*, kiu dum kelkaj jaroj en la postmilita periodo liveris al la specialistoj pri esperantologio unikan fonton de informoj kaj unikan forumon. Tiu revuo abrupte ĉesis aperi en 1961, en la mezo de jarkolekto, pro teknikaj problemoj en la eldonado.

Nuntempe, kiam pluraj Esperanto-gazetoj baraktas kontraŭ kreskantaj kostoj kaj forte laboras por entute pluvivi, estus erare lanĉi novan revuon, eĉ se tiu revuo estus konceptita laŭ la altaj fakaj normoj de la iama *Esperantologio*. Aliflanke, la ekfloro de interesiĝo pri interlingvistiko kaj esperantologio, klare sentebla en la kreskanta nombro kaj kvalito de fakaj konferencoj pri tiuj temoj kaj en la Esperanto-eldonado, montras, ke ekzistas bezono por pliaj, kaj pli prestiĝaj lokoj por aperi fakajn artikolojn.

Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) ricevis rajtigon de la Estraro de UEA plani aperigon de ĉiujara volumo, kun la titolo *Esperantologio*, kiu esence daŭrigu la revuon. La unua volumo kompletigos la jarkolekton (volumon) de 1961.

Redaktos tiun unuan volumon la iama redaktoro de *Esperantologio*, d-ro Paul Neergaard, kaj d-ro Humphrey Tonkin, direktoro de CED.


Kvankam restas kelkaj manuskriptoj el la unua epoko de la revuo, mankas sufiĉa materialo por la nova eldono. Sekve la redaktoroj invitas ĉiujn esperantologojn liveri al ili taŭgajn manuskriptojn. Tiuj manuskriptoj estu nepre de universitat-nivela scienca kvalito. Ili estu tajpitaj kun duobla interlinia spaco, sur A4-formata papero, kun notoj ĉe la fino. Ilin akompanu resumo de 100-200 vortoj. Ili estu senditaj

ekzempleroj al d-ro Humphrey Tonkin, Office e President, State University College, Potsdam, 13676, Usono. La redaktoroj aparte deziras i: a) ĝisdatigitajn tekstojn de prelegoj prezenti la Internacia Kongresa Universitato, b) tekstoj de referaĵoj prezentitaj en fakaj konferencoj, c) ellaboritajn studojn de lingvaj, literaturaj aŭ aliaj aspektoj de Esperanto. La manuskriptoj prefere en Esperanto, kvankam oni konsideros non de artikoloj ankaŭ en aliaj lingvoj.

INFORMADO

Poezio kiel informilo

Komence de aprilo Edwin de Kock, unu el niaj renomaj poetoj, sendis leteron al multaj el siaj kolegoj – Esperantaj poetoj. Ekzemplero venis ĝuste al nia redakcio, kun la demando, ĉu ni trovas interese por publikigo. Ne estis malfacile konstati, ĉu la ideoj de Edwin de Kock pri la informa valoro de esperanta poezio estas bonaj kaj subtenindaj. Tamen, la poeto ne traktas alian aspekton de la temo: atingi la ekstermovadan publikon per libroj, ĉu ni en la Movado volas eldoni. Kelkaj sukcesaj ekzempleroj fari tion jam ekzistas (*Verloren van Themaat*



Edwin de Kock volas diskonigi nian poezion.

en Nederlando, Dante Bertolini en Svislando, Marjorie Boulton en Britio, pluraj japanaj aŭtoroj). Tial la ideoj de la sudafrika poeto estas pripensindaj, des pli ke li certe bonvenigus helpon kaj konsilojn pri sia projekto. Skribu al: Edwin de Kock, Posbus 143, RSA-0009 Bon Accord, Sud-Afriko.

Jam multajn jarojn mi kovas ideon, stimulitan interalie de la angla serio *Penguin Poets*. En tiuj libroj aperas poemoj originalaj en la ĉefaj lingvoj, precipe eŭropaj, kun prozaj tradukoj piednote, cele al helpo por la leganto rekte kompreni la tekston kiel ĝin verkis la aŭtoro mem. Tiel li ekzemple frontas la poezion de Victor Hugo en la franca, kiun li legas per komparo kun la suba angligo, ne pretendanta literaturecon, nur esti komprenigilo. Tiumaniere oni ne bezonas vortaron.

Alivorte mi projektas tian antologion por Esperanto, unue kun anglaj proztradukoj. En estos ankaŭ superrigarda enkonduko al nia poezio, biografiaj notoj kaj – librofine – legogramatiko skeleta, kiun la leganto povus, sed ne bezonus, konsulti. Tiel eĉ persono, kiu neniam antaŭe lernis Esperanton, kapablus tuj eklegi ĝian literaturon.

Sed ĉu ne ideo fantazia? Tute ne. Ĝuste tiel rezonas la eldonistoj de *Penguin Poets*, entrepreno jam multvoluma. Komence de preskaŭ ĉiu antologio en tiu serio aperas antaŭparolo de la ĝenerala redaktoro, el kies vortoj mi tradukas:

”Sed ĉi tiuj antologioj celas ne nur tiujn, kiuj vere scipovas fremdajn lingvojn. Ili verŝajne allogos ankaŭ la aventuremulojn, kiuj pro nura amo al la poezio frontus poemon en lingvo, kiun ili ne konas, gvidate nur de sia antaŭa legado kaj iom de la lingvo latina aŭ franca. Tiel, se ili konsentus komenci per zorga komparado laŭvorta, ili baldaŭ ĉesus uzi la anglaĵon, kaj rekte tralegus poemon de Petrarca, Campanella aŭ Montale, de Garcilaso, Góngora aŭ Lorca. Eĉ poezion germanan oni povus aliri laŭ ĉi tiu maniero malortodoksa.

La metodo montriĝas sukcesa. Mi mem jam utiligis ĝin, legante interalie poezion en la hispana, kiun mi ne studis antaŭ tio; kaj, mirinde, mi trovis, ke rapide kreskas la kapablo kompreni tekstojn en ĝi senpere!

En la cititaj vortoj kuŝas ora ŝlosilo ankaŭ por Esperanto – malfermi la trezorejon de nia poezio originala por rekta legado de homoj, kiuj neniam studis lernolibron. Pro la konsisto de la Internacia Lingvo, ĝiaj radikoj multrilate parencas al precipe la latina, franca, hispana, itala, portugala kaj rumana. Multaj homoj almenaŭ pasive scipovas minimume unu el tiuj lingvoj, antaŭ ĉio la intelektularo, kaj speciale la poeziamantoj poliglota. Eĉ pli: serioj kiel *Penguin Poets* (ekzistas ankaŭ aliaj) kvazaŭ antaŭpreparis por ni la legantojn, kiuj jam akiris ian kapablon legi poemojn en tiu aŭ alia lingvo latinida.

Per tia verko ni povus atingi multon. Maksimume ĝi logus al ni novajn samcelanojn altkulturajn, ofte kun postenoj ĉe universitatoj kaj aliaj altlernejoj. Minimume ĝi povus efike nuligi certajn antaŭjuĝojn ĉe personoj, kiuj alie malhelpus la progreson de Esperanto.

Pri la danĝeroj, al kiuj ni estas elmetataj, mi donas la jenan ekzemplon:

Antaŭ kelkaj tagoj studento ĉe la Pretoria Universitato telefonis al la samurba sekretario de nia landa asocio. Li havis tri tre specifajn demandojn: 1) "Kiun libron – ne lernilon – mi povas legi en la angla pri Esperanto?" 2) "Ĉu en Esperanto ekzistas metaforoj?" 3) "Ĉu eblas en Esperanto ankaŭ metonimio?". Pri la lasta demando li estis kurioze insista. Evidentiĝis, ke ĉe la universitato oni ĝuste nun studas la futurromanon de George Orwell, 1984. La studento aludis la en ĝi menciitan Newspeak (Novparolo), lingvoformon severe simpligitan kun la specifa celo malhelpi civitanojn pensi individuisme kaj libere, por sekurigi ŝtatoformon diktaturan. "Estis mia profesoro, kiu petis, ke mi telefonu al vi", li klarigis.

La sekretario povis rekte respondi la unuan demandon, informante, ke en la publika biblioteko troviĝas ekzemplero de *Esperanto in the Modern World* (1982), nove alveninta el Kanado. Pri metaforoj li konfirmis, ke ili ekzistas en Esperanto, sed ekzemplojn li ne povis doni. Pri metonimio li ne sciis, kaj al la plia demando, ĉu oni povus diri, kiel en la angla, "la kaldrono bolas" apud "la akvo bolas", li supozis, ke ne. Feliĉe, tamen, li informis la studenton pri mi kiel poeto, donante al li mian telefonnumeron.

Al mi la studento parolis tute per la samaj demandoj, evidente preparitaj kun ia zorgo. Mi tuj divenis pri kio temas. El sia universitata kadro tiu profesoro, laŭ maniero vere detrua, klopodis ne nur propagandi pri la angla kiel supera lingvo tutplaneda, sed samtempe veneni jam anticipe la mensojn de junaj homoj – precipe geinstruistoj estontaj – kontraŭ Esperanto, la ĝena alternativo. Simple li bezonis utiligi la aktualan furoron pri la libro de Orwell, por sugesti, ke la zamenhofaĵo estas speco de Newspeak, efektiva danĝero por la homaro en ĝia lukto kontraŭ la tiranoj!

Kiel mi respondu en tiu momento eble grava por multaj? Unue, mi rekte konfirmis, ke Esperanto ja povas esprimi kaj metaforojn kaj metonimion. Pri la laste menciita mi citis ekzemplojn el *Plena ilustrita vortaro*, dirante al li, ke mi trovas kaj la vorton metonimio kaj la ekzemplojn tie. Poste mi kondukis lin al fakto, kiu lin tute mirigis: en Esperanto ni havas multe pli ol unuopajn metaforojn aŭ ekzemplojn de metonimio. Ni posedas tutan originalan literaturon poezian.

Mi tuj citis en kaj Esperanto kaj la angla tiun mirindan poemeton de Maura:



*Maro, zorga dommastrino,
faldas re kaj re sen fino
susure silkajn ondojn.
(Sea, a careful housewife,
folds again and again without end
rustlingly silken waves.)*

"Sinjoro, ĉu ne bela, ĉu ne trafa metaforo?" mi demandis al li.

"Absolute!" li respondis.

Poste mi daŭrigis, atentigante, ke en la esprimriĉa Esperanto oni kapablas ne nur metafori multmaniere, sed eĉ verki poemojn superrealismajn kaj modernajn ĉiusence. Kun lia permeso mi voĉlegis el paĝo 96 de *Ŝtupoj sen nomo*, de Baldur Ragnarsson, "Trovinte la Simbolon,..." sed angle – tradukon kiun mi ĵus finis samtage por amiko mia, poeto kiun mi aktuale esperantistigas per nia originala poezio. (Ĉar ankaŭ mi lernis la Internacian Lingvon pro la ekzisto de tia literaturo.)

La studento konsterniĝis. "Kiu estas la aŭtoro de tio?"

"Islandano, kaj poeto ankaŭ en la propra lingvo." Mi aldonis, ke alia grava poeto de Esperanto estas oksfordulino Marjorie Boulton.

Kiel mi atendis, li tuj reagis al tiu nomo, kun surprizo, ĉar mi scias, ke ŝiajn librojn por la studo de angla literaturo uzas ĝuste la angla departemento kun tiuj profesoro kaj studento, ĉe la Pretoria Universitato!

Mi promesis sendi al li kelkajn poemtekstojn, tradukitajn el Esperanto, kun ĝenerala informilo pere de lektorino ĉe la politekniko, kie mi laboras. La finaj vortoj de tiu studento, nun tre imponita, estis: "Eble mia profesoro devus mem telefoni al vi. Ĉu vi konsentis tion?"

"Kial ne?" mi respondis kaj, atentiginte pri tio, ke la lingvoformo plej proksima al Newspeak probable estas Basic English, mi ĉesigis la konversacion. Tiun nokton mia dormo estis al mi dolĉa. Sed la postan tagon mi recerbumis pri la afero. La vera heroo ne estis mi, sed la originala poezio Esperanta, potenciale nia plej forta konvinkilo inter kulturhomoj literaturamantaj, se ni nur povus uzi ĝin laŭ taŭga maniero.

Edwin de Kock

Janton pri internacieco de Esperanto

Sub la Alta Protekto de la ŝtata Sekretario pri Sociaj Aferoj kaj Nacia Solidareco, s-ino Georgina Dufoix, kaj kun apogo de deko da elstaraj personoj – inter kiuj naciaj deputitoj Delehedde, Fevet kaj Rimbault, kaj la fama franca kantisto Guy Beart — komenciĝis la 9an de junio la 76a Nacia Kongreso de la Francaj Esperantistoj en Bourges.

La prezidanto de UFE, Jean-Louis Texier, malfermis la Kongreson kaj la prezidanto de la Loka Kongresa Komitato, Paul Morin, bonvenigis pli ol 150 ĉeestantojn, inter kiuj troviĝis gastoj el ok landoj: Britio, Finnlando, Hungario, FR Germanio, Luksemburgo, Hispanio, Japanio kaj Jugoslavio. Poste parolis la reprezentanto de la urbestro de Bourges.

Posttagmeze la kongresanoj debatis la temon "Kiel sukcesigi Esperanton en Francio?". Krome ĉirkaŭ 50 estroj de lokaj grupoj kaj federacioj de grupoj kunvenis dum du horoj por diskuti informadon kaj varbadon, laŭ speciala plano pri klare direktita informado, starigita de Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE). Oni prezentis al la ĉeestantoj la jam eldonitan materialon por varbado kaj instruado, klarigis kiel utiligi ĝin kaj diskutis la planojn por plibonigoj. Oni substrekis, ke 1985 estos la Jaro de la Junularo, kaj konsilis, ke tiam estus bone aparte agi sur tiu tereno.

Matene de la postaj du tagoj okazis fakaj kunvenoj de instruistoj, aŭtistoj kaj UEA-delegitoj. La

jarkunveno de UFE okazis la 10an. Oni tie raportis pri la farita laboro kaj proklamis la rezulton de la baloto por renovigi trionon de la komitato. La postan tagon kunvenis la nova komitato kaj elektis la estraron. Jean-Louis Texier restas la prezidanto, vicprezidanto fariĝis Jean-Pierre Danvy, dum Jean Guillaume ne rekandidatiĝis por la komitato, sed iĝis honorprezidanto de UFE. Jack-André Rousseau kaj s-ino Renée Triolle restas respektive kasisto kaj sekretario.

La 11an de junio, post komitatkunsido kun partopreno de la estroj de lokaj federacioj, prof. Pierre Janton de la Universitato de Clermont-Ferrand prelegis pri la temo "Ĉu Esperanto estas vere internacia lingvo?". Li demandis, kiaj estas la kriterioj por difini internacian lingvon. Iu ajn nacia lingvo teorie povus fariĝi internacia, sed ĝia povo dependas de sociaj, ekonomiaj kaj politikaj faktoroj. Vere internacia lingvo devas esti sendependa de tiuj faktoroj. Ĝi devas esti fleksebla kaj modlebla, por ensorbi kiel eble plej multe da strukturoj el kiel eble plej granda nombro da lingvoj.

Pierre Janton diris, ke iu usona lingvisto foje difinis tri kriteriojn por klasifi lingvojn: 1) ĉu kutima uzo de prepozicioj aŭ postpozicioj, 2) la kutima loko de la verbo rilate al la subjekto kaj objekto, kaj 3) la kutima loko de la adjektivo, nome ĉu antaŭ aŭ post la substantivo.

Li faris tabelon pri 30 lingvoj kaj rimarkis, ke neniam iu lingvo aperis plurfoje en la tabelo. Sed se li enmetus Esperanton, li povus loki ĝin en ĉiu kategorio.

Tiu fleksebleco de Esperanto permesas plej fidele traduki tekstojn el plej diversaj lingvoj, sen tordi la originalon. Esperanto povas montri kaj analizi kaj sintezan strukturon (ekz. *estas printempo* = *printempas*). Krome, la akuzativa finaĵo permesas transktivigi netransitivajn verbojn.

La elstara povo de Esperanto produkti strukturojn povas esti kriterio de internacieco. En tio troviĝas la facileco kaj evoluforto de Esperanto. Kompreneble ankaŭ Esperanto havas limojn, sed multe malpli ol la naciaj lingvoj.

Posttagmeze la kongresanoj vizitis la malnovan parton de la urbo Bourges kaj muzeojn. La postan tagon okazis tuttaga ekskurso tra la regiono.



La prezidanto de Unuiĝo Franca por Esperanto, s-ro Jean-Louis Texier, parolanta, reelektiĝis.



14



Magazin

25 jaroj da praktika aplikado

En aprilo ĉi-jare festis sian 25-jariĝon la jugoslava fakgazeto **ZET** (Zagreba elektra tramo). Ĉe la festo estis pli ol 200 invititoj, reprezentantoj de la urbo, sindikato, politikaj organizaĵoj, radio, televido kaj gazetaro.

En la solena kunsido, aranĝita de la laborista konsilantaro de la entrepreno, la respondeca redaktoro Borislav Benažić akcentis en sia parolado la utiligon de Esperanto sur unu tuta paĝo sub du diversaj rubrikoj.

Por la rubriko "Širom svijeta" (Tra la mondo) kontribuas 20 esperantistoj el 18 landoj pri la publika urba trafiko de sia lando kaj pri la trafiko ĝenerale. Tiu rubriko aperas en la kroatiserba, dum en Esperanto aperas sub la rubriko "Esperanto" la plej interesaj eroj el la nacilingva parto de la gazeto. Tiel la Internacia Lingvo estas uzata dumaniere.

Dum la tuta 25-jara periodo kunlaboris 51 esperantistoj, kiuj skribis kune 2 004 artikolojn. Tiu atingo estas verŝajne unu el la plej elstaraj nuntempaj ekzemploj de praktika aplikado de Esperanto sur la kampo de la faka ĵurnalismo. Ĝi certe estas modelo por tia agado – kie la Internacia Lingvo praktike servas kiel internacia komunikilo.

ZET aperas monate en kvin mil ekzempleroj, el kiuj 41 oni ekspedas al institucioj, radiostacioj, gazetoj, kunlaborantaj esperantistoj k.a.

Okaze de la festo oni honoris la plej meritplejnajn aktivulojn. Inter ili estis Zvonko Rehorić kiel la gvidanto de la Esperanto-fako de la gazeto dum la tuta 25-jara periodo.

Itala kulturo kaj blindula kongreso

La 52a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj ĉi-jare estis organizita samokaze kun la Festivalo de Itala Kulturo "Italujo: Kulturo kaj Naturo". Ĝi okazis inter la 21a kaj 30a de junio en Pisa-Tirrenia sub alta protekto de ministeria konsilio. El la proksimume ducent aliĝintoj ne povis ĉeesti sovetaĵ kaj rumanaj, tiel ke partoprenis ĉirkaŭ 120 el 17 landoj. La plimulto loĝis en "La du turoj", la kultura centro "G. Fuca" de la itala blindula unuiĝo.

La programo antaŭvidis ĝenerale liberajn matenojn, uzeblajn i.a. por baniĝo en la proksima maro. Naĝ-arton instruis speciala komisiito. Post la 16h30 estis iom densa serio de prelegoj. Ĉi tiuj donis altvaloran, preskaŭ enciklopedian superrigardon pri la itala kulturo al meznombro 50 interesitoj.

Oni prezentis la italan blindulan unuiĝon, kies prezidanto, R. Kervin, mem prelegis: "La nevidantoj en hodiaŭa Italujo". Sekvis prelegoj pri historio: "Italujo: De geografia esprimo al 'preskaŭlando'" de G. Pisoni. Pri la nacia karaktero en antikveco kaj nuntempo parolis Anna Brennan: "La Novjorko de la unua jarcento: ĉiutaga vivo en la antikva Romo" kaj Renato Corsetti: "La italoj sen peno: kelkaj konsideroj pri nuntempaj italoj". Pri muziko prelegis P. Mioli: "La lando de kantarto: de laŭdo ĝis opero" kaj G. Vassio, la prezidanto de la kongresa komitato: "Italujo kaj la instrumentmuziko".

Pri religio parolis G. Franzoni: "La religio de la italoj: popolo kaj eklezio post la Konsilio".

Pri literaturo temis la traktaĵoj de G. Azzi: "De sankta Francisko al Italo Calvino: itala literaturo tra la jarcentoj", A. de Giorgi: "Kien nuntempa itala poezio?", D. Maraini: "La virina specifeco en la itala literaturo", N. Rossi: "Forme internacia, enhave itala: itala Esperanto-kulturo" kaj "Dante, kreinto de interregiona lingvo – Zamenhof, kreinto de internacia lingvo", memore al Clelia Conterno Guglielminetti, kaj de Otto Prytz: "La itala kulturo kaj la skandinaviaj literaturoj".

Pri scienco prelegis Nicola Minnaja: "De Galileo: scienco kaj sciencistoj en Italujo".

Ne mankis ilustro ĉe ĉio ĉi. Vesperon kun la italaj kant-aŭtoroj prezentis Gianfranco Molle, Marcella Fasani kaj Guido Brandenburg. Okazis folkloro vespero, operkoncerto dediĉita al Puccini kaj eĉ koncerto de muziko de Betoven en Florenco. En la blindula centro mem La krizalido regalis sian publikon per "Kafej-teatro" kaj du unuaktaĵoj de Emilija Lapenna: "Forlasitino" kaj "Soleco".

Ekskursoj okazis tuttage al Florenco, kaj duontage al Pisa (kaj la domo de Puccini) kaj al Volterra. Bedaŭrinde kelkaj el la cetero kleraj ĉiĉeronoj itallingvaj ne interesiĝis pri la penado de la improvizaj interpretantoj nek pri la blindula maniero percepti artaĵojn. Necesus klerigi ilin ankaŭ tiurilate.

Tre bone sukcesis la kurso el ok matenaj lecionoj pri la itala lingvo, kiun gvidis s-inoj Carla da Costa kaj Violetta de Filippo. Pli bezonata estis la kurso de Esperanto, kiun gvidis la kompetenta Esperanto-instruisto Raymond Gonin, kvankam partoprenis nur trio da komencantoj.


Mankis la tradicia internacia vespero, kie blindaj esperantistoj kutimas prezenti siajn talentojn fortepiane, kante kaj deklame.

La kongresa temo "La blinda virino en la nuntempa socio" trovis nur dufoje okazon kunigi diskutantojn. Iu substrekis la rolon de la patro en la edukado al egalrajteco. Ĝenerale la blindaj virinoj suferas similajn sociajn problemojn kiel la vidantinoj. Ĝuste tial oni decidis peti enkasetigon de la revuo *Sekso kaj egaleco*, por ke ankaŭ blindaj virinoj povu partopreni en tiu internacia forumo.


La kongresa rezolucio rekomendis, ke la edukantoj kaj pedagogoj konsciigu la infanojn pri la principe egala valoro de ĉiu individuo, senkonsidere pri la sekso kaj korpa stato, kaj per la ekzemploj de elstaraj virinoj, kiel Marie Curie, Florence Nightingale kaj la surda-blinda Hellen Keller, kreskigu respekton ĉe la viroj kaj memfidon ĉe la virinoj. Esperantistoj povus kontribui per eldono kaj diskonigo de tiaj biografioj.

La brajla skribsistemo

Literoj:



Interpunkciaj signoj:



La kunsidoj de Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE) ebligis plurajn gravajn komunikojn kaj opinisondojn. Laŭ decido de la estraro, la brajla transskribaĵo de *Plena analiza gramatiko de Esperanto* havos pli favoran prezon. (Legu pri tio kaj Fonduso Eroŝenko en nia aparta teksto.) La prezon de la brajla eldono de *Gerda malaperis* la estraro fiksas je 4,00 gld.

Por kompletigo de la listo de prunteblaj libroj la estraro faros pliajn klopodojn ĉe naciaj bibliotekoj. Eventuala postsekvanto de la kaseta *Monato* estis elektita. Plimulto preferis *Heroldo de Esperanto*, sed

kelkaj interesiĝis pri *El popola Ĉinio* pro la Universala Kongreso en Pekino. Pri la voĉlegata *Esperanto* multaj esprimis kontenton.

En la fina vespero kvizo kaj teatraĵo pri Zamenhof kiel ekzamenato en Esperanto-ekzameno, en kiu ĉefrolis Dario Besseghini, vekis multajn rideksplodojn.

La kongreso varme dankis ne nur ĉiujn organizintojn sed aparte unu el ili, s-ron Aldo Grassini, kiu demisiis kiel la kasisto de LIBE post 15-jara estraraneco.

Rob Moerbeek

Fonduso Eroŝenko

Antaŭ nelonge LIBE, Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj, aparte titolis unu el siaj fondusoj. Fonduso Eroŝenko ebligas al vide handikapitaj homoj en netranspagipovaj landoj akiri librojn kaj gazetojn en brajlo kaj kasetoj.

La nomo estas memore al la blinda rusa Esperanto-verkisto Vasilij Eroŝenko (1890-1952), kiu longe vivis en Ĉinio kaj Japanio.

LIBE nun laboras kun la granda tasko presigi en brajlo la verkon *Plena analiza gramatiko de Esperanto*. Ĝi konsistos el dek pezaj, dikaj volumoj, kaj la vera kosto estus cent nederlandaj guldenoj por ekzemplero.

Krom tio, ke LIBE jam ŝparis monon por la projekto, la sekcioj de LIBE en FR Germanio kaj Nederlando promesis subvencii per po mil guldenoj. Tial la prezo pagota de aĉetanto reduktiĝis al ĉ. 70 guldenoj. LIBE tamen ĝojis, ke almenaŭ blindaj esperantistoj kun sufiĉe da monrimedoj povus akiri la verkon en por ili uzebla formo. La estraro de LIBE tamen decidis en la ĵus okazinta 52a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj, ke ĝi kostos nur 55,00 guldenojn dank' al donacoj al Fonduso Eroŝenko, kiu akiris jam pli ol mil guldenojn, ĉefe el Nederlando. Ĉar oni jam ricevas petojn el netranspagipovaj kaj neriĉaj landoj, dek kvin ekzempleroj (el eldonkvanto de 70) estos senpage donitaj al ĉefe bibliotekoj kaj redaktoroj en tiaj landoj. LIBE starigis juĝkomisionon por aljuĝi pliajn ekzemplerojn al petantoj.

Fonduso Eroŝenko estas malferma por donacoj. Ĝia poŝta ĝirkonto estas n-ro 53 57 176 je la nomo de LIBE-kasisto, Zwaansmeerstraat 48, 1946 AE Beverwijk, Nederlando. Ankaŭ per banko eblas sendi monon (Rabobank, Beverwijk; konto n-ro 1073-06336), sed la bankkostoj estas altaj. Bonvolu aldoni la celon de la pago.

Evoluigo de la zagreba instrumetodo

Pasintjare 300 zagrebaj volontuloj partoprenis en rapida tritaga lernado de Esperanto. Surprizis la organizantojn ne nur la bonegaj rezultoj, sed ankaŭ la aparta sukceso de memlernaj grupoj, sen instruisto. Post tiu eksperimento la organizantoj, Internacia Kultura Servo (IKS), plue evoluigis "la zagreban metodon".

En 1983 IKS aperigis la kvinan, plibonigitan eldonon de la kroatserba lernolibro *Esperanto: lernolibro de la Internacia Lingvo* kaj tuj daŭrigis preparojn por plibonigoj en la sesa eldono, kiu ĵus aperis en eldonkvanto de dek mil ekzempleroj. Intertempe aperis la bildstria libreto *Kiu estas Jozefo?* de Johán Valano. Ĝin oni adaptis kiel kurs-akompanan legomaterialon. Krome, jam aperis la dua plibonigita eldono de kaseto kun lecionoj kaj speciale adaptitaj kantoj. Ankaŭ ĝi estas verkita de Johán Valano, kaj teknike altkvalita.

La jaroj 1983 kaj 1984 alportis novajn adaptojn al pliaj lingvoj. Aperis hungara kaj aŭstra eldonoj kunlabore kun Hungara Esperanto-Asocio kaj Aŭstria Asocio de Esperanto-Instruistoj. Aliaj tradukoj-adaptoj jam pretaj estas por la itala (Cordovado-Siegenthaler), por la angla (Wells-Cushing) kaj por la franca (Imbert). Sed la identeco kun la originalo, kiun havas la du unue menciitaj eldonoj hungara kaj aŭstra, ebligis entrepreni tute novan eksperimenton: la unuan internacian tritagan Esperanto-kurson, en

kiu partoprenis kune aŭstroj, hungaroj kaj jugoslavo-

voj. En la unika eksperimento partoprenis sep aŭstraj gejunuloj el Judenburg (meza aĝo de 18), kvin hungaroj el Nagykanizsa (meza aĝo de 14) kaj sep zagrebanoj (meza aĝo de 19). La kurso okazis en Zagrebo de la 28a ĝis la 30a de aprilo ĉi-jare, kun kontrola ekzameno la 1-an de majo.

La tuta aranĝo estis tiel planita, ke la gejunuloj kune en la sama klaso ĉiutage lernis po kvar horojn de la naŭa ĝis la dektria, posttagmeze havis komunajn amuzajn kaj turismajn aranĝojn kaj vespere iris al siaj gastigantoj. La aŭstrojn oni lokis ĉe la zagrebanoj en ties hejmoj. La eksperimento montriĝis plia ŝtupo en la evoluigo de la zagreba metodo pro la specifa maniero organizi la lernadon. La plej gravan parton havas la grupa memlernado el la libro kaj la konversaciado en paroj, kaj apartan rolon ludas motivigaj filmoj, kasetoj, bildstrioj ks., dum ĉion oni kombinas kun la tuttaga komuna restado.

La baza demando, al kiu oni deziris respondon, estis, ĉu la elparolon de Esperanto povas tiel rapide kaj ĝis sufiĉe komprenebla grado alproprigi germanlingvanoj kaj hungaroj kiel la jugoslavo-? La eksperimento, laŭ ni, montris, ke pri tio tute ne troviĝas problemoj. Aŭstroj kaj hungaroj tuj post la eklerno parolis Esperanton kun sentebla akcento sed tute kompreneble.

La ekzameno konsistis el skriba kaj buŝa partoj. En la skriba parto oni devis traduki el la nacia lingvo en Esperanton ĉirkaŭ 100-vortan tekston kaj senerarigi donitan tekston. En la buŝa parto oni devis, post kvinminuta preparo de unu temo elektita el dek, paroli pri tiu temo dum kvar minutoj. Post sia trarigardo de la skriba ekzamenparto Zlatko Tišljär, konsiderinte ĉiujn faktorojn de ambaŭ partoj, donis finan noton (noto 1 = nesukceso, notoj 2 ĝis 5 = sukcesoj).

Grupo	Tuta nombro	Meza noto	Meza aĝo	Diritaj frazoj meze	El tio subjunkte kunmetitaj	Nombro de nesukcesoj	% de nesukcesoj
aŭstra	7	4,30	18	13	3	0	0
jugoslava	6	2,83	19	9,5	1	1	16
hungara	4	1,50	14	7	0	2	50
Entute	17	3,11	17	10,3	1,5	3	17


Rimarko: En la eksperimento partoprenis entute du pliaj lernantoj, hungara kaj zagreba, kiujn ni ĉi tie ne enkalkulis. La hungarino lernis la lingvon jam antaŭe kaj tial ne estis komparebla, dum la zagrebano ne venis ekzameniĝi (kvankam li verŝajne havus tre bonan rezulton, ĉar dum la kurso li estis unu el la plej lertaj).

Zlatko Tišljär kaj Ivica Špoljarec

Redakcia noto: La nombro de partoprenantoj verŝajne estas tro malgranda, por ke oni povu eltiri sciencon konkludon.

Sed la eksperimento alportis al ni plurajn novajn sciojn pri tia rapidega instruado:

1. Por sukceso en la lernado la plej grava faktoro estas forta kaj vera lernmotivo. Tiuj gejunuloj, kiuj venis kun vera deziro lerni Esperanton por akiri pere de ĝi internaciajn kontaktojn, ellernis nekredeble multe dum tiuj tri tagoj. Se la motivoj ne estas tiaj (ekz. se la lernanto studas Esperanton en lernejo de instruisto, kiu instruas al tiu ankaŭ alian stud-objekton, kaj la motivo estas profita, kiel ekzemple gajni favoron de la instruisto, aŭ se la lernanto venas por trovi amikon el Aŭstrio por povi kun tiu paroli germane), la rezultoj estas sufiĉe malkontentigaj.



Jen la kvina eldono de la kroatserba lernolibro por komencantoj Esperanto: lernolibro de la Internacia Lingvo, kiu pli kaj pli internacie populariĝas pere de siaj jam multlingvaj adaptuoj.

2. Intereso pri Esperanto inter mezlernejanoj de okcidentaj evoluintaj landoj kiel Aŭstrio estas la sama kiel en orienteŭropaj landoj, kondiĉe ke oni prezentu al ili Esperanton tuj kiel eblecon kontakti eksterlandanojn. Sistema de du semajnfinaĵoj kursoj laŭ la zagreba metodo estas ideala maniero rapide vastigi la Movadon inter la junularo ankaŭ en evoluintaj landoj, kiuj nun havas malfortan esperantistaron.

Oni varbas por la kurso samtempe en du diversaj urboj de du landoj najbaraj. Ambaŭ grupoj prepare memlernas du lecionojn hejme. Sekvas unu semajnfino

no de komuna lernado, kiam la unua grupo veturas al la alia urbo eksterlanda, lernas kune kun la alilandanoj kaj loĝas en iliaj hejmoj. Post unu aŭ du semajnoj la dua grupo vojaĝas al la urbo de la unua kaj tie lernas la duan duonon de la lernolibro. En tiaj kursoj nekredeble fortiĝas la amikeco inter la diverslandanoj, kiuj ekhavis la komunikeblecon nur post tiel mallonga lernotempo, ke ilia motivo daŭrigi lerni kaj tuj aktivigi en la Esperanto-movado pluroble pligrandiĝas.

3. Tre grava problemo estas elekti por tiaj kursoj gejunulojn de la sama aĝo. Aĝdiferencoj senteble influas la rezultojn.

4. La plej grava problemo estis nesufiĉa tempo finlerni la antaŭviditan stokon de 300 vortoj. Tial en estontaj kursoj oni lernos la vortojn en la prepara fazo.

Post la analizo de la enketiloj, sur kiuj ĉiu lernanto respondis al sep demandoj, vidiĝas, ke plej multe entuziasmigis ilin la ebleco akiri tiel rapide kaj senpere novajn eksterlandajn amikojn. En la metodo plej plaĉis al ili la ebleco memlerni laŭ la propra sinorganizo kaj la ebleco konversacii pare kun eksterlandano. Krome ili tre laŭdis la uzon de krommaterialoj, aparte la bildstrion. Lerni gramatikon por ĉiuj estis tre facile, dum mankis tempo por lerni la vortojn. Senescepte ĉiuj volas daŭrigi la lernadon kaj pluteni la akiritajn kontaktojn.

La plej grandan entuziasmon prezentis la aŭstra grupo, kiu havis escepte bonajn rezultojn kun la meza ekzamenoto 4,3 en sistemo kun maksimuma noto de 5, sen iu ajn malsukcesinto kaj kun meze dek tri eldiritaj frazoj dum kvarminuta monologo pri elektita temo. La meza noto por ĉiuj 17 ekzamenitoj estis 3,11, kun dek eldiritaj frazoj dum kvar minutoj, el kiuj 1,5 estis subjunkciaj. Estis nur tri malsukcesintaj ekzamenitoj, kio estas 15%.

La eksperimento sendube grave influas la pluan perfektigon de la zagreba metodo. La sesa kroatserba eldono de la lernolibro montriĝis jam tre konvena kaj ne plu necesas ŝanĝoj en ĝi. Jam aperis tute identa germana eldono, kaj pretas la angla kaj itala. Krome aperis franca, malta, kataluna, kirunda kaj slovena eldonoj. Oni jam interkonsentis pri identaj eldonoj ankaŭ en la hungara kaj pola. Traktadoj okazas ankaŭ kun bulgaroj. Kompreneble oni preparas pliajn eldonojn en jugoslaviaj lingvoj, la slovena, makedona kaj albana. Sekve la metodo baldaŭ aplikiĝos en ne malmultaj landoj. Internacia Kultura Servo daŭre aplikos la metodon daŭre pli konsekvence dum po du semajnfinoj kun zagrebanoj kaj kursanoj el la najbaraj landoj Italio, Aŭstrio kaj Hungario. IKS volonte mem demonstros la metodon en iu ajn lando, kien oni invitos ĝiajn agantojn. Pliaj informoj haveblas de Internacia Kultura Servo, P.F. 499, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

Zlatko Tišljari

La Universitato de Unuiĝintaj Nacioj

La Universitato por Paco, kiun Unuiĝintaj Nacioj (UN) lastatempe starigis en Kostariko, havas kiel ĉefan celon la esploron kaj instruadon de metodoj por konstrui la fundamentojn de paco en la diversaj socioj de la mondo. Ĝi tamen ne estas la unua universitat-nivela institucio kreita de UN. Jam en 1972, donante formon kaj substancon al ideo unue kovita de la iama ĝenerala sekretario U Thant, Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko faris unuajn paŝojn por lanĉi la Universitaton de Unuiĝintaj Nacioj, kun ĉefsidejo en Tokio.

La Universitato de UN (UUN) estis establita, laŭ ties Ĉarto, kiel "internacia komunumo de universitatoj, kiuj faras esplorojn, postdiploman edukadon kaj disvastigon de scioj, tiel antaŭenigante la celojn kaj principojn de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj." La rektoro de la Universitato estas konata indonezia klerulo Soedjatmako, kaj ĝiaj nunaj vicrektoroj estas civitanoj de Gano, Japanujo, Svedujo kaj Kolombio.

La Universitato ne havas studentojn laŭ la normala senco de tiu vorto. Ĝi laboras plejparte per "asociigitaj institucioj": universitatoj kaj esploroj en diversaj partoj de la mondo, kiuj plenumas ĝiajn esplorprojektojn kaj liveras specialigitan instruadon al plenaĝaj instruantoj, plejparte ligitaj al la diversaj registaroj aŭ al UN-instancoj. Tamen ĝia ĉefsidejo iom post iom fariĝas intelekta centro pro dungigo de specialistoj, nomigo de gastesploristoj ktp. La Universitaton finansas ĉefe kapitalo donacita de la ŝtatoj-membroj de UN. Ĉar temas pri kapitalaj donacoj, kiuj siavice donas renton por financi la programojn, UUN estas esence liberigita de la premoj kaj necerteco, kiuj limigas la laboron de la aliaj UN-instancoj, dependaj de siaj jaraj buĝetoj, pri kiuj voĉdonas la ŝtatoj-membroj.

En la unua periodo de sia agado, la Universitato laboris per tri bazaj programoj: Monda malsato, Homa kaj socia evoluigo kaj Naturaj rimedoj. La programeroj lanĉitaj en tiu unua periodo nun venas al fino, kaj anstataŭas ilin kvin "temoj" aŭ "programdirektoj". La unua pritraktas "Pacon, sekurecon, konflikto-solvadon kaj tutmondan transformadon" – la temo plej proksima al la laboro de tiu alia, jam menciita Universitato en Kostariko (per "tutmonda transformado" oni celas la rolon de la ŝtato en ĝenerala evoluigo de la monda kaj homa kondiĉo). Dua temo rilatas al la "Monda ekonomio". Tria pritraktas "Malsaton, malriĉon, rimedojn kaj la homan medion". La



kvina temo esploras "Sciencon kaj teknologion kaj iliajn sociajn kaj etikajn implicojn".

La kvara temo estas plej interesa por ni parolantoj de la Internacia Lingvo. Ĝi rilatas al "Homa kaj socia evoluigo kaj la kunekzistado de popoloj, kulturoj kaj sociaj sistemoj". Ĝi traktas interalie "la bezonon pli grandigi la kapablon de la tutmonda socio je tolerado kaj je kunlaboro trans la baroj de raso, etno, lingvo, religio kaj ideologio".

En la fruaj jaroj de UUN okazis pluraj kontaktoj inter funkciuloj de la Universitato kaj UEA. La prezidanto de UEA vizitis la sidejon de UUN en Japanujo kaj renkontiĝis en Usono kun la tiama rektoro de la Universitato kaj unu el la vicrektoroj. Kvankam oni montris ĝeneralan interesiĝon pri la internacia lingvo-problemo, tia, kia ĝi estas konceptita de nia Asocio, UUN kaj UEA ne venis al interkonsento pri specifaj iniciatoj por esplori la konsekvencojn de lingvaj diferencoj je monda skalo. UEA restas en kontakto kun la Universitato, kvankam nur rutine. Eble nun venas la tempo denove interveni por konvinki la Universitaton okupiĝi, kune kun ni, pri lingvaj demandoj.

La anglalingva mallongigo por la Universitato de Unuiĝintaj Nacioj estas UNU: tre taŭga Esperanta titolo por tiu ĉi unika iniciato konstrui unuecan kaj kunlaboreman mondon. Laŭ la unua prezidanto de ĝia konsilio, Roger Gaudry el Kanado, la Universitato estas "klopodo laborigi kiel teamon la plej bonajn cerbojn de la mondo por solvi la grandajn problemojn de la homaro". Granda idealo. Granda tasko.

Humphrey Tonkin



Tiuj, kiuj interesiĝas pri la laboro de Unuiĝintaj Nacioj kaj ĝiaj specialigitaj instancoj, kiel ankaŭ pri la lingva demando en la sino de tiuj internaciaj institucioj, povas regule ricevi aktualajn informojn pri tio pere de la de UEA eldonata bulteno *UN kaj ni* kontraŭ duono de MJ-kotizo por dek numeroj.

Monumentaj tradukoj

La romantika periodo; Tra la parko de la franca poezio. El la franca trad. Gaston Waringhien (1901). Ascoli Piceno: Eldono Gabrielli, 1982. 322p. 20cm. Beletra Eldonserio, n-ro 17. Dulingva: Esperanta-franca. Prezo: 24,90 gld.

Estas feliĉe, ke *La romantika periodo*, la tria volumo de la serio *Tra la parko de la franca poezio*, sekvas la formaton de la jam aperintaj *Renesanca periodo* (1971) kaj *Klasika periodo* (1980) kun la samaj meritoj, t.e. modelaj Esperantaj tradukoj kun, vid-al-vide, originalaj franclingvaj tekstoj, valoraj notoj pri lingvaj malfacilaĵoj, kulturaj aludoj, bibliografiaj referencoj kaj koncizaj sed penetraj enkondukoj.

La romantika periodo pritraktas, krom la romantika skolo proprasence, ankaŭ la ceteran deknaŭan jarcenton. La plej poeziriĉa el la tuta literaturhistorio franca, ĝi senesperigas per sia abunda materialo por ĝustaj elekto kaj ordigo. Waringhien sekvas la tradicion, vidante tri ĉefajn skolojn: la romantikan (1820-1850), la parnasisman (1850-1885) kaj la simbolisman (1885-1902). Mankas en ĉi tiu antologio tri gravegaj poetoj (Baudelaire, Heredia kaj parte Nerval) sed nur ĉar Waringhien jam dediĉis al ĉiu el ili plenan volumon da tradukoj (*La floroj de l' malbono* (1957) de Baudelaire, tradukita kune kun Kalocsay). Aliflanke, troviĝas pluraj poemoj kaj poetoj novaj kredible eĉ al tiuj, kiuj iom konas la francan poezion. Kiel kriteriojn por sia elekto, Waringhien mencias amplekson, tradukeblecon kaj personan preferon.

Efektive, antologio ne povas ne esti iugrade persona kaj subjektiva, des pli kiam temas pri amaso da trezoroj. La personan stampon de Waringhien oni vidas ĉie. Liaj enkondukaj notoj prezentas prijuĝojn kaj sintenojn originalajn sed ne draste ikonrompemajn. Ili rezultas tutevidente el longjara studado kaj meditado, kiuj kondukas al novaj ordigoj kaj aprezoj. Kelkajn poetojn (ekz. Lamartine, Verlaine kaj R gnier) li pli alte taksas ol la kritiko ĝenerale. Kvankam la tradicio rigardas Mallarm  kiel la ĉefon kaj modelulon de la simbolisma skolo, Waringhien lin lokas en la fino de la parnasisma periodo. Finfine gravas, kompreneble, ne la klasigo mem sed la freŝaj perceptoj, per kiuj li prilumas la koncernajn poetojn. Eĉ spertuloj pri la franca poezio trovos multan utilon en ĉi tiu kolekto, ne malpleje en la abundaj klarigoj pri la hermetikaj poemoj de Mallarm  kaj Rimbaud.

La nura nomo Waringhien garantias pri la kvalito de la tradukoj; laŭdoj kaj admiro ne plu bezoniĝas al

li. Certe, neniuj alia tradukanto povus alporti samtempe tiom da sperteco, klereco, diligento kaj amo al ĉi tiuj malfacilaj tradukotaskoj. Foje oni sentas la restantajjn postsignojn de la tradukobarakto, ekz. ĉe la tradukoj de Lamartine, kie la kristalpura flueco de la originalo rezistas kaptiĝon en Esperanto. Preferante fidelecon spiritan ol literan, la tradukanto ne hezitas ete aliigi rimskemon aŭ figuron, se li tiel povas konservi iun pli gravan belaĵon de la originalo. Estas en la tradukoj de la parnasistoj, precipe en tiuj de Leconte de Lisle, kie Waringhien superas sin mem, foje atingante perfekte kontentigajn tradukojn. Ĉu pro la ecoj de Esperanto mem, ĉu pro lia antaŭa spertado de Nerval, Baudelaire kaj Heredia, klare evidentiĝas lia afineco al la nobla, densa kaj iom rigida stilo de la parnasistoj.

Ne laste inter la meritoj de ĉi tiu verko rangas ĝia bibliografia valoro. Waringhien konceptas sian antologion kiel kompletigan parton de la tuto de la franca poezio tradukita en Esperanton. Li do konstante indikas la ceterajn indajn tradukojn – domaĝe nur, ke al la tradukoj fare de Kalocsay li ne referencas laŭ la nova *Tutmonda sonoro* (1981). En neniuj alia verko oni eltrovos tiel oportune, ĉu iu poemo jam estas tradukita kaj se jes, kie ĝi aperis.

Tiuj, kiuj ne povas permesi al si la tutan serion *Tra la parko*, tamen akiru ĉi tiun volumon. Ĝi certe estas la plej grava el la serio pro la sinsekvo de brilaj poemoj brile tradukitaj. Monumento de la Esperanta kulturo ĝi fariĝos. Nepre havinda.

James F. Cool (Usono)

Alispecaj rememoroj

Matenaj floroj kolektitaj en vespero (1928), Lusin (pseŭd. de Zhou Shuren, 1881-1936). El la ĉina. Pekino: El popola Ĉinio, 1981. 158p. 19cm. 10-Es-1387P. Prezo: 3,30 gld.

Lusin verkis tiujn ĉi dek eseojn en 1926, kun interesaj antaŭparolo kaj postskribo en 1927.

Kiam li verkis ilin, li estis nur 46-jara, sed jam sentis sian vivon finonta. Li mortis en 1936. Ĉi tie li rememoras sian pasintecon, sian junaĝon, siajn studojn en Japanio, kaj ankaŭ parolas pri bibliografio.

La traduko estas en bona Esperanto. Sed legante ĝin, sentema okcidenta leganto ekkomprenas kiel esence *malsama* estas la socio kiun Lusin priskribas; foje, per unu vorto iom strange, nekutime uzita, ni plonĝas en alispecan universon – por kiu ni ne estas preparitaj! Iru studi la ĉinajn lingvon kaj historion dum du jaroj, kiel mi faris; iru loĝi en Ĉinio dum jaro – tamen ĝi restas por ni kvazaŭ fremda planedo. Ni estu dankaj, ke nia "interplaneda lingvo" permesas al ni trai tiun breĉon.

Richard Cash (Francio)

Pionira studo pri la Movado

The Esperanto Movement, Peter G. Forster (1944). Hago: Mouton Publishers, 1982. 14+413p. 23cm. Contributions to the Sociology of Language, n-ro 32. ISBN 90 279 3399 5. Prezo: 37,50 gld.

Tiu ĉi grava libro pritraktas en detala maniero la fenomenon de Esperanto, de ĝiaj historio kaj kulturo, surbaze de la ĝisfundaj esploroj kaj sagacaj analizoj de kompetenta sociologo. Kvankam la materialaj faktoj grandparte jam aperis diversloke, ekz. en *Esperanto en perspektivo*, la granda valoro de la verko de Forster kuŝas en tio, ke ĝi verkiĝis ne por celoj propagandaj, sed kiel serioza kaj objektiva studo pri sociologie ŭnika movado. Kiel tia, ĝi prezentas ankaŭ konkludojn kaj juĝojn pri nia movado, pri ĝiaj venkoj kaj malvenkoj, kiujn devus koni kaj konsideri ĉiu serioza esperantisto-aktivulo.

Forster unue faris la verkon kiel doktoran disertacion ĉe la Universitato de Hull en Britujo, do kompreneble en la angla lingvo. La nuna libro, ankaŭ en la angla, estas reviziita kaj ĝisdatigita formo de la traktaĵo, kiun la universitato akceptis en 1977. La lingvaĵo ne ĉiam estas facila, eĉ por denaska angla-lingvano, pro la ofta uzo de la ĵargonvortoj, tiel karaj al la koroj de kleruloj-fakuloj ĉie. Sed per okaza sinturno al bona vortaro la meza leganto ne trovos tion serioza baro.

Same kiel la ĵargono, eble, evidentiĝas, kvazaŭ deviga por universitata homstuda fakulo, eta kontraŭreligia antaŭjuĝo. Ekzemple, por iuj legantoj montriĝos aparte ofenda lia ŝajnigo, ke la sofismajn lertojn de la malbonfama Louis de Beaufront rezultiĝis ties frua edukiĝo kiel jezuito.

Cetere iom ĝenas la kelkfoje malglata traduko de Esperantaj frazoj kaj terminoj. Forster angligas laŭvorte kaj, miaopinie tro favoras parencvortojn. Kial, ekzemple, "la verda standardo" fariĝu *the green standard* anstataŭ la multe pli kutima kaj eleganta *the green flag*? En alia loko li tradukas:

Kion disigis ne unu miljaro
Tion kunigis Bulonjo ĉe l' Maro.

Lia anglalingva versio estas:

*What not merely one millennium set apart
Boulogne-sur-Mer brought together.*

Tio donas la ekzaktan sencon, sed sonas rigida, malgracia. Kial ne traduki, ekzemple:

*What thousands of years had set apart
Were joined again at Boulogne-sur-Mer.*

Krom tiu ĉi mallonga katalogo de mankoj ne tro seriozaj, unu pli grava difekto estas la bedaŭrinda neekzisto de indekso, sen kiu la libro perdas iom el sia valoro kiel konsultverko. Spite tiun malhavon, la li-

bro certe meritas lokon sur la breto de seriozaj angla-lingvaj movadanoj.

Kiel ripetiĝanta temo en la verko aperadas la streĉiteco inter "normorientita" kaj "valororientita" interpretoj de la esperantismo. Tio estas: Forster vidas kiel gravan faktoron en la evoluo de nia movado la konflikton inter "instrumentaj" kaj "esprimivaj" tendencoj – alivorte la ankoraŭ neniam definitive solvitajn demandojn, ĉu Esperanto estas "nur lingvo", do afero pure praktika, aŭ ĉu ĝi estas ilo por pliproksimigi la popolojn, forigi militojn ktp., do afero unuarange idealisma. Forster ne donas respondon al la demando, sed li ŝajnas vidi gravan signifon en la nekapablo de la esperantistoj ĝin respondi.

Estas interese, ke la aŭtoro eĉ en la Ido-skismo vidas esprimon de tiu konflikto: la esperantistoj rifuzis fari ŝanĝojn en la lingvo pro principaj, se ne diri emociaj motivoj, dum la "science senpasiaj" idistoj ne hezitis forĵeti kaj reforĝi kion ajn por krei, laŭ ili, lingvon pli praktike utiligeblan. Ankaŭ ne eskapis la observemon de Forster, ke Zamenhof – kies idealismaj kaj sentimentalaj sinesprimoj ofte embarasis la fruajn esperantistojn – havis du vivpasiojn: krom krei universalan lingvon, li esperis krei ankaŭ universalan religion.

Iuj legantoj certe malkonsentos kun Forster pri ties aserto, ke Zamenhof kontraŭstaris reformojn en Esperanto pro idealismaj kialoj. La faktoj ŝajnas abundaj por subteni la tradician konkludon, ke la aŭtoro de nia lingvo timis disfalon de la tuta afero, kiel fakte disfalis Volapuko, se iam la esperantistoj perdus fidon al la fundamenta kontinueco de sia lingvo. Forster tamen konkludas alie, vidante la aferon en la lumo de sociologia teorio.

Cetere la aŭtoro prezentas la Ido-aferon kvazaŭ la skismo restus aktuala por ĉiu hodiaŭa esperantisto. Citante neniun bibliografian fonton pli freŝan ol de 1934, li permesas supozi, ke tiu lingvo daŭre minacas la nian. Fakte, multe surprizus min, se eĉ unu procento de la esperantistoj konsiderus Idon kiel ion alian ol historian kuriozaĵon.

Unu aparte interesa ĉapitro studas la rilatojn inter la Esperanto-movado kaj Ligo de Nacioj, dum la jaroj inter la du mondmilitoj. Forster konkludas, ke la homoj, kiuj rolis en la administrado de la diversaj instancoj de la Ligo ĝenerale estis homoj, kiuj dividis kun la esperantistoj internaciismajn sentojn, sed ke finfine la potenco por fari realajn ŝanĝojn restis en la manoj de homoj, kiuj volis antaŭenigi interesojn naciajn. Tial okazis, ke Esperanto akiris certan kvanton da diskonigo kaj eĉ aklamo, sed malmulte da rezultoj konkretaj. Kiel ni scias, en la fino estis tamen la Ligo, kiu malaperis, dum restas Esperanto, nun akirinta sian lokon kiel signifa, kvankam neoficiala kaj aparta socia fenomeno.

Kontraste kun tio, Forster analizas la postmilitajn jarojn kiel periodon, kiam Esperanto transiris de fido al la ordinaraĵoj al malnaive organizita plano por akiri subtenon de personoj gravaj en la publika vivo. Li ĝuste aljuĝas tiun planon kaj ĝiajn relativajn sukcesojn al la influoj de Ivo Lapenna. Sed simile al la kaŭzoj de malsukceso ĉe Ligo de Nacioj, ankaŭ nun la grandiganta prestiĝo de nia movado ne rezultigis vere signifoplenajn venkojn. Denove tiujn fruktojn rifuzis al ni la naciismaj tendencoj, kiuj en nia tempo plej frape manifestiĝis per la "malvarma" milito.

Forster dediĉas multan atenton ankaŭ al la demando pri "stranguloj" (angle: *cranks*) en la Esperanto-movado, kaj atribuas al Lapenna ĝeneralan pliseri- oziĝon de la esperantistoj. Restas la fakto, ke inter niaj vicoj troviĝas pli da "originalaj" individuoj ol en la ĝenerala homaro – aŭ tiel ŝajnas. Forster aplikas la teknikojn de sociologia studado kaj konkludas, ke dum nia movado fakte ne estas "stranguleca", ĝi posedas sufiĉe da karakterizaĵoj komunaj al movadoj de veraj stranguloj, ke oni tro facile vidas ankaŭ nian kiel tian.

La aŭtoro kompilis grandan nombron da tabeloj kaj grafikaĵoj, por montri la konsiston de la Esperanto-movado en la daŭro de ĝia historio. Liaj ciferoj montras, ekzemple, ke la plej sukcesa penetrado de nia lingvo dum la fruaj jaroj estis en landoj, kie oni parolis minoritatajn lingvojn, aŭ pli ol unu lingvon. Principe tio ankoraŭ validas, kvankam kun perturboj kaŭzitaj de politikaj cirkonstancoj en certaj regionoj.

Proksimume trionon de la libro Forster dediĉas al studo pri la Esperanto-movado en unu lando, nome en Britujo. Kredeble la britaj esperantistoj estas pli-malpli reprezentaj de tiuj en la aliaj mondpartoj, sed la aŭtoro zorge atentigas ankaŭ pri pluraj diferencoj. Precipe la fakto, ke multaj britoj kredas, ke la angla lingvo jam konkeras la mondon, iel influas la socian konsiston de la tiulanda esperantistaro. En ĉiu kazo lia konkludo fascinas. Laŭ li, la meza parolanto de nia lingvo en Britujo estas vira, iom maljuna, pli ol meze bone edukita mezklasulo, kun malgranda familio

Lerta en sia profesio, li probable loĝas en regiono neindustriigita, kaj estas pli probable, ol en kazo de ĝenerala loĝantaro, ke li estas instruisto. Ŝajnas krome, ke li estas malpli religia ol la ĝenerala loĝantaro, sed se li tamen ja estas religia, li estas pli aktive tia, ol estas vere en la kazo de la loĝantaro ĝenerale.

Forster konkludas, ke Esperanto ĝis nun ne venkis ĉar la mondo ankoraŭ ne konsideras, ke ĝiaj celoj estas prioritare urgaj. Kvankam Esperanto povus esti bonega solvo al la lingva problemo, la mondo preferas improviziajn duonrimedojn. Li mencias ankaŭ subkonsciajn faktorojn, kiuj kontraŭstaras ĝeneralan akcepton de nia lingvo. Li citas ekzemple J.F. Flügel, laŭ kiu estas stranga sed nekontestebla fakto, ke al tre multaj kleraj homoj, la ideo de artefarita lingvo efikas ne nur forpuŝe, sed eĉ naŭze, dum inter sciencistoj ĝi povas esti rigardata kiel science hereza. Ankaŭ tiu ĉi psikologia faktoro helpas bildigi esperantistojn kiel strangulojn.

La aŭtoro ne proponas planon por venki niajn dilemojn. Sed se ni konsideras, ke por solvi problemon oni devas unue kolekti la faktojn kaj fronti ilin tiaj, kiaj ili vere estas, Forster kunmetis verŝajne valorajn donitaĵojn, kio povos nur helpi en tiu direkto.

David Richardson (Usono)



Teatraĵo pri amo kaj mono

Vespera gruo, Zyunzi Kinosita. El la japana trad. Masao Miyamoto (1913). Ōsaka: Japana Esperanta Librokooperativo, 1982. 73p. Ilus. 19cm. Prezo: 13,80 gld.

Ĉi-foje en la Esperanto-literaturon venis bela fabela rakonteto kun kortuŝa enhavo, vestita en la formo de teatraĵo por kvar roluloj. Tipe japaneska estas la priskribo de la naturo kaj ĉirkaŭaĵo. Ĉio estiĝas kvazaŭ per tuŝetoj de la arta peniko.

En kvietaj izolita kabano feliĉe ĝuas trankvilan vivon la geedzoj Yohyō (li) kaj Tû (ŝi). Ili amplene zorgas unu pri la alia. Sed la aspiron de Tû, vivi eterne enfermita en la rondo de la du solaj geamantoj, iom post iom komencas bari la deziro de Yohyō, kiu evidente estas monavido. Pri tio igas lin obsediĝi la du fimakleristoj Sôdo kaj Unzu. Yohyō fine estas delogita al la mondo, regata de mono, tute fremda al Tû. Sole ŝi ĝis la fino restas senriproĉe pura kaj virta, kvankam ŝi kondukas kiel decas al la tipe japana virino (rimarkindas la scenaro sur p.48). Tû fakte estas gruo, kiu fariĝis la edzino de Yohyō, sed kiu povus plu resti virino nur apud viro de alta moraleco. Tiel finfine ruiniĝis la amo inter la geedzoj.

Mi bedaŭras, ke la elegantan simpatian verketon makulas kelkloke ne tre taŭgaj lingvouzoj. Senteblas,



ke la teksto estas fidela al la originala, sed tio impresas min kvazaŭ mallerta traduko el la japana. Mi simple notos la paĝojn kaj liniojn (minuso indikas linion de sube): 14/-5, 16/-6, 20/-1, 30/5, 10, 41/-2, 48/-1, 56/8, 62/1,4,5,-5; kaj nur unusola preseraro sur paĝo 64: *blea* anstataŭ "bela". Krome, dum la legado ĝenas kelkaj neuzataj interjekcioj.

Tamen estas ja vere inde legi ĉi tiun libreton, por konstati kiel facile oni perceptas la puran etoson de la amrakonto kaj travivas ties dramecan finon.

Sergej Anikejev (Soveta Unio)

Bukedo de popola poezio

Elpafu la sagon; El la buŝa poezio de la mondo, komp. Tibor Sekelj (1912). Rotterdam: UEA, 1983. 187p. Ilus. 21cm. Serio Oriento-Okcidento n-ro 18. ISBN 92 9017 025 5. Prezo: broŝ. 27,00 gld.; bind. 36,00 gld.

Jen unika verko en la Internacia Lingvo, kolekto de 137 buŝaj versaĵoj rikoltitaj de la fame konata etnografo Tibor Sekelj dum liaj esplorvojaĝoj, kiuj havigis al li ŝancojn lerni lingvojn de malgrandaj popoloj, kolekti kaj esperantigi iliajn buŝajn poemojn. Tiu ĉi poemaro tradukita el 24 lingvoj similas al bukedo de sovaĝaj floroj plukitaj dum ekskurso, freŝaj kun natura belo. Legante la versaĵojn, mi spertis jen dolĉan senton de amo, jen naivan ĝojon de songanto, jen doloran triston de homo perdinta sian karulon. Ili estas karakterizitaj per simpleco kaj sincereco. Ili montras al ni, ke ĝenerale la homaj sentoj estas ĉie samaj, kvankam la moroj, kutimoj kaj vivkondiĉoj de la popoloj en la mondo varias de loko al loko. Tio ja prezentas bazon por kultura interfluo kaj kunlaboro

de la popoloj en strebado por komuna bono. Post trailego de la poemoj mi tamen estis kaptita de la demando, ĉu ne necesas prezenti la diferencojn inter la moroj, kutimoj, kulturoj de la popoloj por pli bona interkompreno.

La lingvaĵo de la traduko fluas kiel facila prozo, kaj evidentaj plumeraroj kiel *teruriga*, *raviga* (p.131), *konfuziga* (p.134) kaj *ĉarmiga* (p.51) kun superflua -ig- certe ne malhelpas la ĝuadon de la bela poezio. En tiu ĉi verko Tibor Sekelj enkondukis preskaŭ 50 neologismojn el afrikaj, aziaj, sudamerikaj kaj oceanaj lingvoj por "akceli la veran internaciecon de la lingvo". Inter ili *maozio*, *ĝanpino* kaj *svejalti* estas, laŭ aserto de la enkondukinto, prenitaj el la ĉina lingvo. Mi rekonis la vorton *maozi* (elp. maŭcz), tamen ĝi signifas en la ĉina lingvo ne "larĝan konusforman ĉapelon el pajlo, palmfolioj aŭ bambuo" kiel la noto en la libro montras, sed nur kapveston. Mi dubas, ĉu estas necese enkonduki *maozio* en Esperanton, se pajlĉapelo, bambuĉapelo kaj palmĉapelo estas aplikeblaj por diri la koncernajn aferojn. Mi ne povas rekoni la vortojn *ĝanpino* kaj *svejalti*, kvankam mi uzis la ĉinan dum dekoj da jaroj kaj konas kelkajn dialektojn. La silaboj *sve* kaj *jal* estas neeblaj en la ĉina, tial mi dubas ankaŭ pri la ĉineco de *svejalti*. Mi ne kontraŭstaras neologismojn ĝenerale, tamen mi timas, ke nenecesa ŝveligo de la Esperanta vortaro tiel malfaciligos la lingvon, ke ĝia disvastiĝo estos malhelpata.

Kompreneble, tiu ĉi poemaro ne povas prezenti al ni panoramon de la buŝa poezio de ĉiuj etnoj. Kaj tamen ĝi ja ludas rimarkindan rolon kiel komenca volumo de multe pli ampleksa kolekto kompletigota de volumoj el aliaj diligentaj manoj.

Li Shijun "Laŭlum" (Ĉinio)

Laste aperis . . .

Akademiaj studoj 1984, red. R. Eichholz (1922). Bailieboro: Esperanto Press, 1984. 135p. Mimeo. 30cm. Plejparte represoj de 26 artikoloj pri landnomoj, aspektoj kaj majuskloj. Prezo: 21,00 gld.

De Patronia al Ŝekspir. Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof, parto 2, volumo 1. Kioto: Eldonejo Ludovikito, 1984. 16+439p. Ilus. de M. Fruscieva. 22cm. La unuaj tradukoj de Zamenhof de 1887 ĝis 1895, reproduktitaj laŭ la originalaj presaĵoj. Prezo: 48,00 gld.

Ekofuturo, komp. Hristo Marinov. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1984. 420p. Ilus. Mimeo. 21cm. Dudek sep diverslandaj kontribuoj sub tri sekciubrikoj: Nuntempa ekologio kaj teoriaj problemoj, Naturaj riĉfontoj kaj estonteco kaj Estonteco kaj energio. Prezo: 21,00 gld.

Faktoj kaj fantazioj, Marjorie Boulton (1924). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1984. 431p. Ilus. 21cm. ISBN 92 9017 028 X. Legolibro por progresintoj, speciale komisiita de UEA, kun 52 variaj ĉapitroj de i.a. fabeloj, rakontoj kaj kuriozaĵoj el la tuta mondo. Prezo: 36,00 gld.

Febro, István Nemere (1944). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1984. 131p. 20cm. ISBN 963 571 143 3. Originala romano de aŭtoro bone konata pro sia elstara parola stilo. Prezo: 15,00 gld.



Hejmoj de birdoj, Ju Zi. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1983. 37p. Kolorilus. de Wu Daisheng. 21cm. 88-Es-203P. Plenkolora infanlibreto pri birdoj kaj ties nestoj. Prezo: 4,20 gld.

Kiu estas Jozefo?, Johán Valano kaj Vjekoslav Ivezić. Zagrebo: Internacia Kultura Servo, 1984. 18p. Ilus. 21cm. Bildstria rakonto en facila lingvaĵo, verkita kiel ekzercolegajo akompane al "la zagreba instrumetodo". Prezo: 3,00 gld.

Kongresa libro; 69a Universala Kongreso de Esperanto, red. Diccon Masterman. Rotterdam: UEA, 1984. 97p. Ilus. 21cm.

La oficiala informilo por la UK en Vankuvero, kun interesaj artikoloj pri Kanado kaj resumoj pri prelegoj de Internacia Kongresa Universitato ktp. Prezo: 10,00 gld.

Lenore/Lenora (1773), Gottfried August Bürger (1747-1794). El la germana trad. R. Haupenthal. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1984. 25p. 20cm. Jubilea Eldonserio 2: Beletro tradukita 6. Dulingva: Esperanta-germana. Balado de aŭtoro, kies verkoj estas konataj per sia originaleco, tensio kaj energia ritmo. Prezo: 5,70 gld.



Lineamenti di lessicografia dell' esperanto, Pietro Rizzo. Pisa: Edistudio, 1983. 61p. 24cm. Ampleksa itallingva kritiko de la vortaro *Vocabolario italiano-esperanto* (Verona, 1981) kaj la Esperanta leksikografio ĝenerale. Prezo: 7,50 gld.

Ludoviko en Nederlando (1957), Pierre Delaire. Orleano: Centre National Espéranto-Office, 1984 (represo). 48p. Ilus. 21cm. Dek-ĉapitra legolibreto por progresantoj. Prezo: 15,30 guldenoj.

Mi serĉas mian perditan... (1976), Shel Silverstein. Esperantigis So Gilsu. Seulo: Korea Ligo de Esperantistaj Instruistoj, 1983. 107p. Ilus. 22cm. Simpla rakonto por infanoj. Prezo: 15,00 gld.

Opetusministeriön esperantotyöryhmän muistio. Helsinki: Opetusministeriö, 1984. 57p. Tabejoj. Mimeo. 30cm. Opetusministeriön työryhmien muistioita 1984: 19. ISSN 0359-761X. Oficiala raporto de la Edukministerio de Finnlando pri la pozicio de Esperanto, kun rekomendoj; resumoj en Esperanto kaj la sveda. Prezo: 6,00 gld.

Ora Pozidono, La, Julian Modest (1952). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1984. 68p. 20cm. ISBN 963 571 132 8. Originale verkita rakonto. Prezo: 8,10 gld.

Pensoj kaj protestoj, Feiko Munniksma (1915). Kopenhago: Eld. Perspektivo, 1984. 37p. Ilus. 21cm. Japanstila senrjua poemo, akompanata de japanstilaj tuĉpentraĵoj de Pierre Gaborit (1924). Prezo: 9,00 gld.

Pioniroj kaj veteranoj de MEM; Skizoj kaj rememoroj, Nikola Aleksiev. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1983. 68p. Ilus. 20cm. Prezo: 7,50 gld.

Rabeno de Baharaĥ, La (ĉ. 1835), Heinrich Heine (1797-1856). El la germana trad. L.L. Zamenhof (1924). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1984 (represo). 47p. 19cm. Jubilea

Eldonserio 2: Beletro tradukita 7. Prozaĵo de verkisto de mondliteratura formato en Zamenhofa traduko. Prezo: 5,70 guldenoj.

Revenas mi, Ĵak Le Puil. Pisa: Edistudio/La kancerkliniko, 1984. Kaseto, kun tekstolibreto (10p., 21cm). Muzika kulturo. Dek kantoj, originalaj kaj tradukitaj. Prezo: 21,00 gld.

Robaioj, La, Umar Kajjam (ĉ. 1045-ĉ. 1122). El la persa trad. (1953) Gaston Waringhien (1901). Antverpeno/La Laguna/Chapécó: TK/Stafeto/Fonto, 1984 (2a eld.). 107p. 21cm. ISBN 90 3660 032 0. Unu el la plej famaj poemoj de la mondliteraturo, kun ampleksaj antaŭparolo, enkonduko kaj notoj. Prezo: 12,00 gld.

Scienca interlingvistika simpozio, red. Ryszard Rokicki. Varsovio: Akademickie Centrum Interlingwistyczne, 1984. 160p. 21cm. Acta Interlinguistica. Dudek naŭ prelegoj el la 11a Scienca Interlingvistika Simpozio, kiu okazis en Varsovio en aprilo 1983. Prezo: 18,00 gld.

Sferoj – 3; Sciencfikcio kaj fantasto, div. aŭtoroj. Komp. Miguel Gutierrez Aduriz. Santander: la kompilinto, 1984. 130p. Ilus. 19cm. ISBN 84 398 1230 2. Dek du sciencfikciaj rakontoj originale verkita en Esperanto de ok aŭtoroj. Bela grafika prezento. Prezo: 18,00 gld.

Shijieyu shi (1911/27), Edmond Privat (1889-1962). El Esperanto en la ĉinan trad. Zhang Hongfan. Pekino: Zhishi Chubanshe, 1983. 290p. Ilus. 19cm. Ambaŭ partoj de *Historio de la lingvo Esperanto* de Privat, kun artikolo de la tradukinto kaj antaŭparolo de Chu Tunan. Prezo: 15,00 gld.

Sindonema arbo, La (1964), Shel Silverstein. Esperantigis So Gilsu. Seulo: Korea Ligo de Esperantistaj Instruistoj, 1983. 59p. Ilus. 22cm. Vorte kaj desegne ĉarma rakonto pri la rilato inter homo kaj arbo, ne sole por infanoj. Prezo: 9,90 gld.

Suomi-esperanto-suomi; Taskusanakirja (1969), Joel Vilkki (1900-1976) kaj Heljä Favén. Porvoo/Helsinki/Juva: Werner Söderström oy., 1982 (2a eld.). 449p. 12cm. ISBN 951 0 08606 1. Reviziita dudirekta poŝvortaro finna-Esperanta. Prezo: 45,00 gld.

Tuta Esperanto, La; Gramatiko por progresintoj, gvidilo por kursestroj (1938), Henrik Seppik (1905). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1984 (3a eld.). 184p. 19cm. ISBN 963 571 127 X. Praktike verkita gramatiko kaj stila gvidilo. Prezo: 15,00 gld.

Vivo de Sándor Kőrösi Csoma, La, Ferenc Szilágyi (1895-1967). El la hungara trad. Ervin Fenyvesi. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1984. 151p. Ilus. 20cm. ISBN 963 571 139 5. Biografio pri la hungara aventuremulo kaj poligloto Sándor Kőrösi Csoma (1784-1842), kiu vojaĝis tra Azio al Tibeto, kie li fondis la tibetologion. Verkita de fama Esperanta aŭtoro, kun bela grafika prezento. Prezo: 15,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 5%, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 guldenoj. Antaŭdankon pro via mendo!

Kontribuojn sendu al la ĝenerala sekretario de TEJO: N. Saletti, Via Libia 20/4-1, I-40138 Bologna.

Informado per rokmuziko

La karaktero de la nuntempa socio, ĉefe de la junularo, foje postulas novajn, pli taŭgajn rimedojn por la amasa informado pri tia kultura kaj socia fenomeno, kia estas Esperanto. La komunikilo plej ŝatata de la gejunuloj verŝajne estas la moderna muziko. Do, ankaŭ pere de ĝi ni informu la junularon pri la aktualeco kaj vivanteco de la Internacia Lingvo.

Tion ebligis al ni la skandinava ensemblo Amplifiki, kiu konsistas el Bertil Wennergren (Svedio), Mikke Englund (Svedio) kaj Kim Henriksen (Danlando). Ilin jam konas la partoprenintoj en la lastaj internaciaj seminarioj de Germana Esperanto-Junularo. Amplifiki prezentis ankaŭ en la pasintjara Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Debrecen (Hungario) kaj en la ĉi-jara Internacia Festivalo de Itala Esperanto-Junularo en Rimini (Italio).

La aranĝantoj de tiu festivalo proponis profiti el la veno de la ensemblo al Italio per organizado de turneo tra la lando, kun serio de Esperanto-konzertoj por la junularo. Tion ili faris laŭ la skemo de la februara turneo de la bulgaraj kantistoj Maria Angelova kaj Veselin Damjanov.

Aliĝis al la propono la Esperanto-kluboj de Gorizia, Lucca kaj Torino. En la ĉi-lastata urbo, tamen, ni elpensis iom malsaman formulon por prezenti la aferon. Anstataŭ rokmuzika konzerto en Esperanto, kiu allogus nur esperantistojn kaj malmultajn scivolemuojn, ni decidis aranĝi serion de tri internaciaj koncertoj sub la komuna nomo "Rock per la paco" (Rokmuziko por la paco), kun partopreno de la ensemblo Amplifiki, sed ankaŭ de loka ensemblo, jam konata de la potenciala publiko.

Ĉi tiu formulo montriĝis tute trafa. Efektive, tiuj koncertoj ricevis oficialan aprobon kaj subtenon de la publikaj instancoj. Ili disponigis la koncertejojn, presigis abundan kaj belaspektan propagandmaterialon kaj disdonis ĝin kapilare per la oficiala informada reto. Ĉi tio jam estis per si mem vasta propagando por Esperanto.

Krome, la tri koncertojn – okazintajn en Torino, Piosasco kaj Chieri (urbetoj de la torina ĉirkaŭaĵo) – ĉeestis sume pli ol 600 gejunuloj, kiuj plene ĝuis la

spektaklon kaj havis okazon konstati, ke Esperanto efektive estas tute aktuala afero kaj ne mortinta revo de iamaj utopiistoj.

La internaciajn koncertojn "Rokmuziko por la paco" enkondukis dekminuta prelego de profesoro B. Tartaglia de la Torina Politekniko, membro de la komitato "Sciencistoj por la paco", kiu substrekis la kontribuon de la Internacia Lingvo al paca kunvivado sur nia planedo. La ĉeestantoj ricevis informfoliojn pri Esperanto kaj invitilojn por niaj venontaj aranĝoj.

La konkretajn fruktojn de la iniciato ni vidos nur en la venonta lernojarro, sed jam eblas aserti, ke ĝi estis plene sukcesa kaj imitinda.



La rokmuzika ensemblo Amplifiki el Skandinavio prezentas en la pasinta TEJO-seminario.


Tiuj, kiuj eventuale interesiĝus pri simila invito al la ensemblo Amplifiki, povos ĉeesti ilian prezentadon en la venonta novembro. La ensemblo estos unu el la multaj artistaj grupoj, kiujn eblos rigardi en la dua Esperanta Kanzono kaj Teatra Festivalo en Parizo.

Pedro Aguilar Solá

Ĉu vi jam mendis la 11an eldonon de la listo de gastigantoj de **Pasporta Servo de TEJO**. Ĝi proponas al vi pli ol 650 tranoktejojn en 50 landoj. La libreto (kaj la rajto uzi la servon) kostas 6 germanajn markojn (aŭ 5 int. respondkuponojn) inkl. sendokoston de HAPS, p/a Germana Esperanto-junularo, Postfach 10 14 22, D-2000 Hamburg 1, FR Germanio. La sumon vi povas ĝiri al GEJ ĉe pĉk. 337 17-201 (Hamburg). La libreto, kiu cetere enhavas mapojn, estas aĉetebla ankaŭ ĉe multaj landaj perantoj kaj de la Libroservo de UEA (prezo 6,90 gld. plus sendokostoj de 10%).

● **Ĉinio:** De decembro pasintjare aperas en Ĉinio neregula plenkolora bildperiodaĵo en Esperanto, kiu nomiĝas *Ĉinio en bildoj*. Kompilas ĝin la redakcio de la bildgazetoj "Ĉinio", kiujn oni eldonas en tre multaj lingvoj. La Esperanta periodaĵo estas en faldfolia formo kun la formato 25,5 × 12cm. Ĝin distribuas la Esperanta Sekcio de Guoji Shudian, P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

● **Hispanio:** Okaze de la 44a Hispana Kongreso de Esperanto oni eldonis kunlabore kun la urbodomo kvar plenkolorajn broŝurojn pri la urbo Seviljo. Ili estas senpage riceveblaj de Excmo. Ayuntamiento (Turismo), Plaza Nueva 1, Sevilla-1, Hispanio.



● **Vjetnamio:** En la urbo Ho Chi Minh s-ro Ngo Chan Ly gvidas du Esperanto-kursojn. La unuan partoprenas 12 akupunkturistoj, la alian kurson 18 gejunuloj.

● **Rumanio:** De la 7a ĝis la 15a de decembro pasintjare okazis ekspozicio de Esperantaj libroj kaj revuoj sub la titolo "Literaturo en Esperanto" en la halo de la municipa biblioteko "Mihail Sadoveanu" en Bukareŝto. Aŭspiciis la ekspozicion la biblioteko kaj kulturdomo de la ĉefurbo. La malfermon partoprenis universitataj profesoroj Gabriel Tepelea kaj Aurel Boia. Dum tuta semajno vizitis la ekspozicion grandnombra publiko.

● En la Universitato de Timișoara ok personoj sub la gvido de prof. I.F. Bociort kompilas grandan dudirektan

Esperanto-rumanan vortaron, kiun oni esperas eldoni en la venontaj tri jaroj.

● **Irlando:** Oni lastatempe raportis al ni pri regulaj semajnfinaĵoj de Esperanto por komencantoj, organizataj de la Esperanto-klubo de Dublino. La klubo antaŭ nelonge akiris pli grandan kunvenejon en la centro de la urbo.

● **Korea Respubliko:** La 23an de marto Zamenhof-klubo festis sian 300-an kunsidon. La klubo konsistas el pioniraj koreaj esperantistoj. Oni fondis ĝin en 1977 kaj poste kunsidis ĉiun vendredon krom en la varmegaj someraj tagoj. La feston aranĝis ne la pioniroj de la klubo, sed Korea Esperanto-Junularo.

● **Kolombio:** La 16an kaj 17an de junio renkontiĝis 35 esperantistoj en Bogoto por aŭskulti diverstemajn prelegojn. Oni krome diskutis pri la organizo de la loka movado kaj manieroj fortikigi Kolombian Esperanto-Ligon.

● **Italio:** Je la instigo de esperantistaj fervojistoj en Bologna, anoj de Itala Socialisma Partio (PSI) okazigis je la 28a de majo debaton pri la eŭropaj kultura kaj lingva problemoj. Prelegis eŭropa parlamentano Gaetano Arfé. La kunveno poste rezoluciis al la partio. Raportis pri la debato la ĵurnalo *Avanti!* (130 000 ekzempleroj), kiu la 17an de

januaro, la 7an de marto, la 3an de aprilo kaj la 5an de junio publikigis longajn artikolojn pri Esperanto de Alberto Menabene. Alian publikan kunvenon "Al eŭropa unuiĝo – Kiel ni interparolos?" okazigis samlokaj fervojistoj la 7an de junio. Pluraj junaj homoj aliĝis al kurso.

● **Norvegio:** En sia jarraporto pri 1983 Norvega Esperantista Ligo (NEL) skribis, ke nun estas pli facile aranĝi kurson aŭ seminarion je ekonomie favoraj kondiĉoj. Por la unua fojo aperis sistema gramatiko de Esperanto en la norvega lingvo: *Esperanto-grammatikk* de Odd Tangerud. Sur la informa kampo aperis la nova broŝuro *Hei Du* (Saluton al vi), kiu trovis vastan akcepton ĉe la publiko. Aliflanke NEL ankoraŭ spertas problemojn pri sia membronombro. Ĝi tamen konkludas: "La ĝenerala impresado estas, ke la grundo estas preparata, sed la rikolto povos efektiviĝi nur post kelka tempo kaj per plua sindona laboro de la membraro."

● **Soveta Unio:** Laŭ informo troviĝas en Soveta Unio entute 160 Esperanto-klubo en 92 urboj.

● **Venezuelo:** De la 12a ĝis la 14a de oktobro okazos la 2a Renkontiĝo de la Venezuela Esperantistaro. La unua tia kunveno allogis 70 personojn en 1982. Venezuela Esperanto-Asocio (Apartado 47675, Caracas 1041-A) invitas al laborkunvenoj, ekskursoj, popolkulturaj prezentadoj, bankedo kaj balo. VEA intencas eluzi la fakton, ke la unua tago de la Renkontiĝo estas ankaŭ la Tago de la Malkovro de Ameriko.

● **Vojaĝado:** En la broŝuro *Inter-Rail*, eldonata de la fervoja administracio de FR Germanio (DB) por 1984, aperas la sekva teksto en la germana: "Trankvilecojn por Esperanto-parolantoj en multaj landoj ofertas Germana Esperanto-Junularo, Postfach 101422, 2000 Hamburg 1. Tie oni ricevas informojn pri tiu facile lernebla internacia lingvo kaj la liston de privataj gastigantoj, kiu enhavas proksimume 500 adresojn en ĉirkaŭ 50 landoj." Tiel informiĝas pri Esperanto kaj Pasporta Servo de TEJO dekmiloj da gejunuloj, kiuj profitas de la aparte favora bileto valida en 20 eŭropaj landoj. Ĉar la fervojoj publikigas la bro-

ŝuron ĉie en unueca aspekto, estas verŝajne eble aperigi similan tekston pri Esperanto ankaŭ en la ceteraj 19 landoj.

● **Festivalo:** Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE) organizas ankaŭ ĉi-jare publikan festivalon de Esperantaj teatro kaj kanzonoj en Parizo. Ĝi okazos la 24an kaj 25an de novembro. Jam konsentis partopreni la pariza Esperanto-teatro Tespa kaj pluraj konataj esperantistaj artistoj. Kiel pasintjare la festivalo estos libervole spektebla kontraŭ enirpago. UFE krome peros kontaktojn kun hoteloj. Pliajn detalojn donas UFE, 4bis rue de la Cerisaie, F-75004 Paris, Francio.

● **Komputado:** Surbaze de kvinlingva komputika vortaro (Budapeŝto, 1972) kaj de la internacia normo ISO 2382, nun prepariĝas eldono de dudirekta Esperanta-angla komputika vortaro. Jam eblas diskuti pri la unua parto de litero A ĝis M. Tiuj, kiuj deziras kunlabori per kritikoj kaj proponoj pri la tradukoj, povas peti senpagan kopion de la unua provizora parto de s-ro Christian Bertin, CCETT AIS, rue du Clos Courtel, B.P. 59, F-35510 Cesson-Sevigne, Francio. Oni planas eldoni la vortaron jam en la fino de la nuna jaro.

● **Lernejoj:** Germana Esperanto-Instituto kaj Baden-Virtemberga Esperanto-Ligo organizas seminarion "Esperanto kaj Lernejo — Eblaj kontribuoj de Esperanto por la celoj de pedagogiaj kaj klerigaj instancoj". Ĝi okazos de la 28a ĝis la 30a de septembro en Konstanz, suda FR Germanio. Inter la partoprenantoj estos d-ro Maslankowski de la Germana Federacia Ministerio pri Klerigo kaj Scienco kaj fakuloj de lernejaj instancoj. Informas: Bavelo, Kolpingstr. 8, D-7790 Messkirch, FR Germanio.

● **Lingvo-instruado:** La 15a kongreso de Internacia Federacio de Asocioj de Lingvo-Instruistoj okazos en Helsinko, Finnlando, de la 22a ĝis la 26a de julio 1985. Kvankam la informbroŝuro kun alvoko por prelegantoj aperis en la germana, angla kaj franca, la organizantoj asertas, ke referaĵoj povas esti en iu ajn lingvo, ĉar la kongreso interesiĝas pri ĉiuj lingvoj. La aranĝanto estas la finna asocio de lingvo-instruistoj: Suomen Vieraskielten Opettajain Liitto, Annankatu 22 A 1, SF-00100 Helsinki, Finnlando.

● **Navigado:** Pro daŭraj malfaciloj kaj miskomprenoj en la komunikado inter ŝipoj kaj la tero, kio povas esti vivdan-

ĝera, oni en Britio ellaboris "lingvon", kiu nomiĝas Seaspeak (Marparolo). Ĝi estas speco de faciligita angla lingvo. La daŭre pli komplika navigado postulas daŭre pli da lingvoscio de la internaciaj navigistoj, dum pli ol 90% de ili ne posedas la anglan kiel gepatran lingvon. La internacia naviga sekcio de Unuiĝintaj Nacioj intencas esplori la taŭgecon de la nova kodo.

● **Informado:** En la maja numero de la oficiala organo de la usona filatela societo *The American Philatelist* aperis kvarpaĝa artikolo pri Esperanto, Zamenhof kaj Esperantaj poŝtmarkoj, verkita de d-ro Frank Nuessel, profesoro pri modernaj lingvoj kaj lingvistiko en la Universitato de Louisville kaj vicredaktoro de *Language Problems and Language Planning*.

Persone

● **Drajev:** La 29an de majo Ŝtata Prezidio de Bulgario honoris Kiril Drajev per la ora ordeno "Ruĝa standardo de la laboro" pro aktiva agado en la sfero de la kulturo kaj 25-jara gvido de Bulgara Esperanto-Teatro.

● **Drees:** La 5an de julio festis sian 98an datrevenon d-ro Willem Drees, ĉefministro de Nederlando de 1948 ĝis 1958 kaj

membro de Honora Patrona Komitato de UEA.

● **Piron:** Puŝita al tia decido de kelkaj lastatempaj misuzoj de siaj tekstoj, Claude Piron (25 Chemin des Rannaux, CH-1296 Coppet, Svislando) petis nin atentigi la esperantistaron, "ke estas malpermesite reprodukti, traduki aŭ iel publikigi, en iu ajn lingvo, la artikolojn de Claude Piron sen lia permeso."



● **Bakin:** En la 47a Internacia Konferenco de Pen-klubo, kiu okazis en Tokio de la 13a ĝis la 19a de majo, prelegis la fama ĉina verkisto Bakin (Ba Jin), kiu estas i.a. la prezidanto de la ĉina Pen-klubo, membro de Honora Patrona Komitato de UEA kaj vicprezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo. En la bonveniga bankedo Bakin salutis nome de la ĉina delegacio. La bankedon partoprenis kvin reprezentantoj de Japana Esperanto-Instituto. Samtage eldoniĝis la Esperanta traduko de la japana verko *Loulan kaj fremdregionano* de Yasusi Inoue, prezidanto de la japana Pen-klubo kaj ĉeforganizanto de la Konferenco. Ĝi aperis ĉe Japana Esperanto-Instituto kiel la dudeka en la prestiĝa serio *Oriento-Okcidento*. Tiel la aŭtoro mem povis transdoni ekzemplaron de la libro al Bakin. Bakin siaflanke donacis sian verkon *Aŭtuno en la printempo* (1932) kiel ankaŭ ekzemplaron de *Printempo en la aŭtuno* (1931) de Julio Baghy, kiu inspiris ĝin. Sur la foto s-ro Yosimi Umeda, vicprezidanto de UEA, salutas s-ran Bakin, kiu sidas ĉe la tablo.



● **Virina agado:** "Virinoj kapablas" estis la titolo de la ĝis nun plej granda virina foiro en Eŭropo. Ĝi okazis en la urbo Gotenburgo de la 3a ĝis la 6a de majo, kun ekonomia apogo de la sveda ŝtato. Inter la prezentitaj ideoj kaj varoj funkciis budo pri Esperanto kun eksponspaco de 12 kvadrataj metroj, kiun prizorgis Internacia Virina Agado. La foirejon vizitis ĉirkaŭ 40 000 homoj. Cento da Esperanto-lernolibroj vendiĝis, kaj plurdeko da homoj aliĝis al kursoj. Oni krome elmontris manlaboraĵojn de esperantistinoj el pluraj landoj.

● **Lernejoj:** En septembro pasintjare la licea Esperanto-grupo de Munster decidis malkovri al la cetera lernantaro la landon, kiun ĝi ekkonis de unu jaro per intensa legado de *La espero el Koreujo*. Kun la helpo de Korea Esperanto-Asocio, la Ambasadado de Korea Respubliko en Parizo kaj pluraj koreaj esperantistoj, la grupanoj kaj iliaj instruistoj starigis 18-tabulan ekspozicion pri Koreio. Post la nunaj someraj ferioj ĝi vojaĝos tra la mezlernejoj kaj liceoj de la regiono Alzaco. Financan helpon disponigis la servoj de la Ministerio pri Edukado. La grupanoj registris en kaseto sonojn de siaj regiono kaj lando kaj sendis ĝin kiel dank-esprimon al helpintoj.

● **Radio:** Okaze de la 25-jara jubileo de la Esperantaj elsendoj de Radio Polonia, Varsovio, oni multfoje intervjuis la estron de ties Esperanto-fako Andrzej Pettyn. La 4an de aprilo la redakcio de la Elsendoj por Polaj Loĝantoj Eksterlande prezentis 10-minutan intervjuon kun li. Samtage la franclingva redakcio intervjuis Pettyn en sia ĉefa vespera programo. La sekvan tagon li donis 10-minutan intervjuon al la itala redakcio, kaj la 14an de aprilo samlonge intervjuis lin la germanlingva redakcio. Tiun intervjuon oni dufoje elsendis en la ĉefa germanlingva programo. Samtage okazis 5-minuta kaj 12-minuta intervjuoj en la pola enlanda radio.

Nekrologo

ANDRÉ BOYER forpasis antaŭ nelonge en Montauroux, Francio. Li estis dumviva membro de UEA ekde 1936.

ZBIGNIEW DOBRZYŃSKI (1936-1984) forpasis en Varsovio la 14an de majo. Li estis teatra kaj filma aktoro, vaste konata ankaŭ en la Movado kiel kunfondinto, reĝisoro kaj ĉefaktoro de Pola Esperanto-Teatro "A. Grabowski". Kune kun sia edzino Kalina Pienkiewicz, Dobrzyński prezentis plurajn teatraĵojn (*Proksima nekonato* de A. Ścibor-Rylski, *Hipnoto* de A. Cwojdzinski, *Malfermu la pordon* de K. Choliński) en kelkaj Universalaj Kongresoj kaj en turneoj tra Eŭropo kaj Usono.

DAVOR DORŠIĆ (1945-1984), jugoslava neŭrokirurgo, kiu de pli ol dek jaroj vivis en Münster (FR Germanio), forpasis la 28an de aprilo. Li estis aktiva esperantisto jam en Zagrebo (Jugoslavio), kie li prezidis la renomatan Studentan Esperanto-Klubon kaj Kroatian Esperantistan Junularan Asocion. Doršić estis talenta aktoro kaj ludis en multaj teatraĵoj de la Drama Sekcio de SEK. Li kunlaboris en UMEA kaj verkis plurajn fakajn librojn (germanlingve).

NERINA GESSAGA mortis antaŭ kelka tempo en Birsfelden, Svislando. Ŝi estis dumviva membro de UEA.

GIM CHONG-WAN forpasis la 4an de aprilo en Korea Respubliko. Li estis direktoro de Korea Esperanto-Asocio kaj prezidanto de ties filio en Gjongbuk-Degu.

SVEN HERLUFSEN (1913-1984) forpasis la 18an de majo en Karlskoga, Svedio. Li estis membro de UEA de 1950 kaj dum pluraj jaroj fakdelegito pri turismo.

RAFAEL PALACIOS HERRANZ (1913-1983) mortis la 4an de aprilo en Almería, Hispanio. Li estis aktiva en la Esperanto-grupo de Bilbao dum 30 jaroj, diversloke agis kiel movada funkciulo kaj kunaranĝis la Hispanan Esperanto-Kongreson en 1966. Li estis fakdelegito pri kooperativismo.

CÉCILE PRAL forpasis antaŭ nelonge en Liono, Francio. Ŝi estis dumviva membro de UEA.

JAN RASZKA (1902-1984) mortis antaŭ iom da tempo en Racibórz, Pollando. Li dum multaj jaroj estis delegito de UEA.

BADIOLLAH SAMIMY (1913-1984), universitata instruisto pri filologio kaj bibliotekisto, forpasis antaŭ nelonge en Teherano, Irano. Li estis pioniro de Esperanto en sia lando. En 1981 aperis lia 750-paĝa *Persa-Esperanta vortaro*. Sekvis ĝin en 1983 lia dua granda verko *Plena Esperanto-persa vortaro*. Li estis la delegito en Teherano.

JOHANNES STEPHANUS VEEN (1920-1984) de Nieuwegein, Nederlando, forpasis en junio en Danlando. Li gajnis en 1982 la premion "Nova talento" kaj pasintjare la duan kaj trian premiojn por prozo en la Belartaj Konkursoj de UEA.

MORTIS SAUL OSIAS (1900-1984)

La 27an de aprilo forpasis Saul Osias en Bukareŝto, Rumanio. Dum pli ol 60 jaroj li tre aktive kaj entuziasme propagandis Esperanton. Li verkis 24 "publikajn leterojn" kaj aliajn artikolojn en Esperanto – vd. ekz. la januaran numeron de *Esperanto*, 1975. Li havis ampleksajn kontaktojn kun esperantistoj tra la tuta mondo.

Anoncetoj

Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncetoj.

35-jara scienca agronomo deziras interŝanĝi maksimum-kartojn kaj bildkartojn kun samhobiuloj tutmonde: Leonid Senj, Poŝtenska Kutija 16, BG-5000 Veliko Tirnovo, Bulgario.

Korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn deziras Mehmet Telyakar, Aydinlik Sokak No. 23, Ortaköy, Istanbul, Turkio.

Nico, Lazura Marbordo, 30 marto – 06 aprilo 1985, Internacia Esperanto-Semajno. Matene kvin diversgradaj Esperanto-kursoj, posttagmeze ekskursoj. Kulturaj vesperoj. Tutrezervita hotelo (dipersojn ĉambroj kun bano/duŝo), tri manĝoj tage. Ĉio enkalkulita, popersono 1 395 F.F. Studentoj kaj infanoj 900 F.F. Petu prospekton: Llorens, Hortensias 2, 121bis Boulevard Napoléon III, F-06200 Nice, Francio. **Neniu aliĝo post la 1-a de oktobro.**

Juna ganano, kiu jam lernis Esperanton dum du jaroj, tre deziras dum unu jaro aŭ pli labori kiel volontulo en eksterlando (simplaj, nefakaj laboroj) kaj finlerni Esperanton. Li povas pagi vojaĝon al (ekzemple) Eŭropo kaj reen, sed aliajn kostojn la gastiganto/laboriganto devus kovri. Bonvolu reagi al s-ro H. Bakker, Kastelenstraat 231, 1082 EG Amsterdam, Nederlando.

S-ino Helga Farukuoye, antaŭe en Ondo, Nigerio, havas novan adreson: Kahlenbergstr, 7-9/6/1, A-1190 Wien, Aŭstrio.

Pro libertempo, postkongresaj laboroj ktp. pluraj oficistoj de la CO de UEA ne estos en Roterdamo dum julio kaj aŭgusto. Kvankam la oficejo estos malferma, ĉiujn vizitojn bonvolu antaŭanonci telefone (tel. 010/36 15 39) kaj skribi nur pri vere urĝaj aferoj. Antaŭdankon pro via kompreno!

Kursgvidantoj! Jarkolekto 1983 de *Kontakto* nun aĉetebla. Jen interesa kaj simpla legomaterialo por viaj kursanoj. La ses numeroj de 1983 estas mendeblaj de la Libroservo de UEA kontraŭ 15 guldenoj plus sendokostoj.

25-jara fraŭlino, komputrogramisto, diplomiĝis universitate pri matematiko, deziras korespondi pri florsekiĝ-odoraĵoj kaj aliaj temoj. Kay Rose, 6714 S. Peoria, Apt. 927, Tulsa, OK 74136, Usono.

Sur bele afrankitaj bildkartoj deziras korespondi tutmonde 30-jara hospital-oficisto Luiz Alberto de Oliveira Coelho, Rua Moreira César 220, BR-25850 Paraíba do Sul (RJ), Brazilo.

Serĉas korespondantojn tutmonde por siaj gelernantoj gvidantino de Esperanta kurso en filatela medio. Ili deziras interŝanĝi leterojn, poŝtmarkojn, bildkartojn ktp. Bonvolu skribi al: Teresa Bellalta Cussó, French 3670, Bo. San Vicente, RA-5006 Córdoba, Argentino. Respondo al ĉiu!

13-jara Fabienne Valet (knabino) ege deziras korespondi kun 13- ĝis 16-jara irananino aŭ japanino pri ĉiaj temoj. Adreso: 1 rue de Maibelle, B-5100 Jambes, Belgio.

Letervespero en la Esperanto-klubo de Göttingen, p/a Tresorier, Bonhoeffer Weg 11, D-3400 Göttingen, FR Germanio; sendu viajn leterojn kaj bildkartojn ĝis la 15a de oktobro.



Per korespondado nun finlernas pluraj junaj esperantistoj en la nova Benina Esperanto-Asocio. Serĉas korespondantojn, kiuj helpas lin ankaŭ perfektigis lingvoscion, 18-jara Eric Dokoui (maldekstre en la foto). Adreso: s/c W. Bernard, PTT, Aplahoué, Benino.

Ni geedziĝis la 27an de julio 1984: Friedrich B. Hilpert kaj Vitoria Rodrigues-Travassos, Rablstr. 18/II, D-8000 München 80, FR Germanio.

Info-Servo, i.a. eldonejo de Tutmonda Esperantista Adresaro, serĉas kunlaborantojn. Skribu al Info-Servo, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio.

Deziras korespondi s-ro Juhani Kiviluoto, P. Lindersvägen 49/2tr., S-151 59 Södertälje, Svedio.

Oficiala Informilo

ADRESŜANĜO EN HINDA UNIO

La adreso de Federacio Esperanto de Bharato nun estas: p/a s-ro Syamsundar Pal, 35/1 Swami Vivekananda Road, Howrah 711 101, Hinda Unio.

SOCIETO ZAMENHOF 1984

Aŭstralio: Marjorie Duncan. Belgio: César Vanbiervliet. Danlando: Ejnar Hansen. Finnlando: Irma E. Heikkilä; Niilo Kavenius. FR Germanio: Bruno Vogelmann; Erich Gunkel. Nederlando: Gertrudis C.A.M. Dercks; W. Spaander.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

KLUBO 777 (minimуме \$777): Aŭstralio: Esperanto-Federacio de N.S.W. Finnlando: Touko Tähtinen. F.R. Ger-

manio: Ruth Paintner-Trumpp. Kanado: Dorothy M. Henderson (3-foja). Usono: Julie M. Dinnel; Esperanto-Societo de Portland, Oregon; Bernice Garrett (2-foja); Rochelle F. Grossman (3-foja); Dorothy Holland; Jacqueline Reynolds; Eugene H. Thompson Jr. (3-foja); Humphrey R. Tonkin (2-foja); Novjorka Laborgrupo.

SUBTENANTOJ (minimume \$25): Francio: Esperantaj Francaj Eldonoj. AMIKOJ (minimume \$10): Svislando: Johannes J. Sturzenegger.

PATRONOJ DE TEJO 1984

Belgio: Elvire De Coene.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

ALVOKO AL INTERESITOJ: Por ricevi – senpage – Esperantajn broŝurojn pri Bibliaj temoj, legado-projekton, ankaŭ studkurson, skribu tuj al: **Internacia Biblio-Misio, 29 Plantation Road, Poole, Britujo BH17 7LN;** aŭ, se ekster Eŭropo, al **P.O. Box 373, Boronia, 3155 Vic., Aŭstralio.**

internacia magazino sendependa

MONATO

UNIKA REVUO EN ESPERANTO

Vere alternativa laŭ multaj aspektoj.

Unu el la plej prestiĝaj
esperanto-revuo

Inform-riĉa, bele ilustrita.

Petu inform-materialon de:

**MONATO, Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen, Belgio.**

LA ROBAIOJ

de Umar Kajjam (ĉ.1045-ĉ.1122)

Poezia ĉefverko de la mondliteraturo, tradukita el la persa de Gaston Waringhien, kun ampleksaj antaŭ-parolo, enkonduko kaj notoj,


Antverpeno/La Laguna/Chapécó: TK/Stafeto/Fonto.
107 paĝoj, 21 cm. ISBN 90 3660 032 0. Prezo: 12,00 gld.
plus sendokostoj. Rabato de unu triono por minimume
tri ekzempleroj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.

KSM

Se vi serĉas seriozajn korespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejoj), turnu vin al la

Koresponda Servo Mondskala de UEA

Adreso: KSM, p/a s-ro R. Llorens,
121 bis, Bd. Napoléon III, F-06200 Nice, Francio.



ESPERANTO

Konatiĝu kun la nova plenkolora Jubilea afiŝo

En la januara numero de nia revuo vi konatiĝis kun nia jubilea simbolo. Tion kreis Hilmar Ilton S. Ferreira el Brazilo; per ĝi li gajnis nian internacian konkurson. La simbolo aperas sube. Sed nia konkurso havis ankaŭ sekcion pri afiŝo. Nun vi havas la okazon konatiĝi supre kun la gajninta verko en tiu sekcio. Ĝin konceptis T. Sekelj kaj realigis H. Gyurkovics el Jugoslavio.

La konatiĝo restas tamen nur parta.


Ne imagu, ke la afiŝo estas nigra/blanka! Ĝi estas plenkolora, kun bluverda fono, flavaj subo (kun sufiĉa spaco por aldono de nacilingva mesaĝo) kaj mano kaj oranĝa terglobo.

Ne imagu, ke vi konatiĝis kun la vera grandeco! Nek kun la gamo de grandecoj. Ni proponas ĝin en formato A3 (30x42cm) kaj A2 (42x60cm).

Ne imagu, ke supre vi konatiĝis kun la vera paperspeco! La afiŝoj estas presitaj sur bonkvalita maldika kartono.

Vere, la plena konatiĝo kuŝas ankoraŭ en via estonteco.

Rapidigu ĝin per mendo al la Libroservo de UEA. La minimuma mendokvanto estas 10 afiŝoj; ekde 30 ekz. vi ricevos trionan rabaton. En A3-formato 10 afiŝoj kostas 15,00 (por nederlandanoj 17,85) gld., en A2-formato 10 kostas 21,00 (por nederlandanoj 25,00) gld., plus sendokostoj.



Konstruu jam nun la jubileon kun ni!



La longe atendita legolibro por progresantoj

- komisiita de UEA
- ideala por memlernantoj kaj gvidantoj de progresigaj kursoj
- de la fama verkistino

Marjorie Boulton

FAKTOJ kaj FANTAZIOJ

- ★ ekzercigas pri frazkonstruado
- ★ kreskigas skrib- kaj parolkapablon
- ★ pligrandigas la vortostokon de la leganto
- ★ uzas simplan stilon en 52 variaj ĉapitroj, plenaj de fabeloj, mirindaĵoj kaj rakontoj pri homaj atingoj kaj kuriozaĵoj el la tuta mondo.

Eldonis Universala Esperanto-Asocio, 1984. 432p. Ilustrita de Alex Brychta. 21 cm. ISBN 92 9017 028 X. Mendu ĉe la Libroservo de UEA. Prezo: 36,00 gld. (plus sendokostoj; rabato de unu triono por minimume tri ekzempleroj).

NOVA INTERNACIA REVUO POR DISTRO KAJ AMUZO

OVO- -ENHAVO:

bildstrioj, humuraĵoj,
sciencfikcio, (ne)kutimaj
intervjuoj, internacia helpo,
favoraj vojaĝeblecoj, konkursoj,
ŝercoj kaj satiroj pri la E-movado,
distraj interesaĵoj, detektivaj romanoj,
naturfenomenoj kaj ... pluraj surprizoj.

OVO—legaĵoj estas ĉiam aktualaj kaj konvenaj
por ĉiu aĝo kaj ĉiu lingvokona nivelo de Esperanto.
OVO precipe konvenas al KOMENCANTOJ.

OVO aperos ĈIUN 3-an SEMAJNON ekde septembro 1984. JARABONO estas 35 nederlandaj guldenoj (aŭ egalvaloro). RABATO: pagantoj ĝis la fino de aŭgusto 1984 pagas nur 29 nederlandajn guldenojn.

Je 10 abonoj unu senpage !

Viajn OVO-numerojn vi povas mendi kaj aboni
ĉe INTERNACIA KULTURA SERVO, 41000
Zagreb, Amruševa 5/1, Jugoslavio.

Bonvolu peti provnumeron !



(041) 424-660

Z14

Lernometodo de Esperanto kreita de zagrebaĵ esperantistoj baziĝas je logika strukturo de Esperanto mem, kaj je la rezultoj de vortofteca esplorado de parolata Esperanto. La antaŭaj eldonoj de la lernolibro laŭ la ZM jam estas adaptitaj al 15 lingvoj. Kromaj help- kaj ekzercomaterialoj, akopanantaj la lernolibron, ebligas tre sukcesan memlernadon, aparte en grupoj kaj kursoj sen tradicia, preleg-predika, funkcio de instruisto. La metodo aplikeblas ankaŭ por rapidegaj, t.n. semajnfinaĵ kursoj. La plej nova (6-a) eldono de la lernolibro ebligas ankaŭ la INTERNACIAJN KURSOJN, kun partoprenantoj el diverslingvaj landoj, ĉar ĝi estas eldonita, en tute identa formo, en la GERMANA, ITALA, HUNGARA, KROATSERBA, FRANCA kaj ANGLA lingvoj.

la zagreba metodo

Kompleto
por la baza
(A) kurso de
Esperanto laŭ
la ZM konsistas el:

- 1 – LERNOLIBRO ...6 gld
- 2 – KASETO kun tekstoj kaj kantoj el la lernolibro10 gld
- 3 – „KIU ESTAS JOZEFO?” - ekzercobildstrio3 gld
- 4 – LA SENTIMULO - romano en facila Esperanto9 gld
- 5 – Instrukcioj por instruistoj1,5 gld

Rabatoj:

- La kompleto + 1-jara abono al „OVO” ...50 gld.
- Por mendoj de minimume 25 lernolibroj kaj 25 bildstrioj oni ricevas senpage 1 kompletan + „Ovo”-jarabonon
- Por minimuma mendo de 10 ekzempleroj de lernolibro aŭ bildstrio aŭ „La Sentimulo” oni ricevas 50% rabaton.

Mendoj ĉe : Internacia Kultura Servo, YU-41000 Zagreb, Amruševa 5/1